

**RAPORTO**  
DE LA  
**VII.<sup>A</sup> HISPANA KONGRESO**

DE  
**ESPERANTO**




**NOVEMBRO**

DE

**1928**

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO



—≡ **SEVILLA** ≡—



Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio



Rodríguez San Pedro 13 - 3ª - 7 - E-28015 MADRID  
Tel. 34 (91) 414 8079

## ¿QUÉ ES EL ESPERANTO?

EL ESPERANTO es un lenguaje armonioso y fácil que, de aprenderlo, puede Vd. relacionarse con todo el mundo.

EL ESPERANTO, basado sobre reglas lógicas y sencillas, con un vocabulario internacional, es de fácil estudio y pronta posesión.

EL ESPERANTO tiene su vida internacional sostenida por un sinnúmero de revistas publicadas en todos los ámbitos del globo y la magna asociación UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO, que cuenta con delegados en todas las ciudades del universo.

EL ESPERANTO constituye el arma redentora que, al unir todas las razas y hombres en un fuerte e irrompible lazo de paz y amor, dará fin a tan abominables hecatombes bélicas.

**Aprended el Esperanto y así contribuiréis al progreso humano, misión que tiene todo hombre sobre la tierra.**

---

### AUTORIZADAS OPINIONES DE HOMBRES CÉLEBRES SOBRE EL ESPERANTO

PIO X: Por medio del Esperanto se nos presenta un brillante porvenir.

TOLSTOI: El esfuerzo que haga todo hombre de nuestro mundo europeo, consagrande algún tiempo al estudio del Esperanto, es tan mínimo, y los resultados que puedan derivarse tan inmensos, que no es posible negarse a hacer este ensayo.

PI Y MARGALL: Nosotros que, tanto quisiéramos ver abatidas las fronteras de los pueblos, no vacilamos en recomendar el estudio del Esperanto a todos los hombres de inteligencia y de corazón, que de veras amen el progreso intelectual y moral de los pueblos.

DR. CORTEZO: Mi curiosidad por la sugestiva lengua auxiliar Esperanto, se convirtió en afición; la afición, en entusiasmo, y el entusiasmo en devoción.

BOIRAC: El Esperanto es el latín de la democracia.

NITTI: El Esperanto representa uno de los más grandes experimentos en la historia de la cultura, siendo una noble empresa de la inteligencia humana y el más grande de los medios de unión entre los pueblos.

---

**Para informes dirigirse a la "SOCIEDAD ESPERANTISTA ESPAÑOLA", calle Sagasta, 10, MADRID**

o a cualquier Federación, Sociedad o Grupo Esperantista existente en las respectivas localidades.



Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID  
Tel. +34 - (9)1 - 4468079

VII.<sup>a</sup> HISPANA KONGRESO  
DE ESPERANTO

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO



BIBLIOTECA

ORGANIZA KONGRESA KOMITATO

SEVILLA 1949

PREMIER LA STAMP

613

16x1970hef002613mf

RECEIVED  
OFFICE OF THE  
SECRETARY OF THE  
NAVY  
WASHINGTON, D. C.



VII<sup>A</sup> HISPANA KONGRESO ESPERANTISTA

EN

SEVILLA

DE LA 5.<sup>A</sup> ĜIS LA 9.<sup>A</sup> DE NOVEMBRO DE 1928<sup>A</sup>


---

---

RAPORTOJ  
FESTOJ, VIZITOJ

KAJ

EKSKURSOJ



ELDONITA

DE LA

ORGANIZA KONGRESA KOMITATO

SEVILLA, 1928

PRESEJO: LA GAVIDIA

## GVIDLIBRO DE SEVILLA

---

Okaze de la «VII.<sup>a</sup> HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO» kaj honore de ĝiaj membroj, la Komitato de Iniciativoj kaj Turismo, de la Urbeŝtaro de Sevilla, eldonis tre belan gvidlibron tra la ĉefurbo de Andaluzio, la urbo fame konata pro siaj preĝejoj, palacoj kaj aliaj historiaj monumentoj. La libro estas presita per verda koloro sur luksa papero, 70—paĝa kaj urboplano; ĝi estas verkita en Esperanto. Multaj fotografiaĵoj pri la mondfamaj vidindaĵoj de la urbo ornamas la libron. Kiu intencas informiĝi pri Sevilla aŭ vojaĝi tien, nepre mendu la libron, sendante du respondkuponojn al la jena adreso:

«COMITÉ DE INICIATIVAS Y TURISMO»

AYUNTAMIENTO DE SEVILLA (HISPANUJO)

---


**KONGRESADRESO:**

**KONGRESO DE ESPERANTO**

**STRATO: RIOJA N.º 25**

**SEVILLA (HISPANUJO)**

---



DOKTORO L. L. ZAMENHOF

Aŭtoro de la Helpa Internacia Lingvo «ESPERANTO»

Naskiĝis 15 Decembro 1859


† Mortis 14 Aprilo 1917

# La Espero





## Himno esperantista

Movo de milita marŝo.

F. DE MÉNIL



1. En la mond-on ven - is nov-a
2. Sub la sankt-a sign-o de l'Es-
3. Sur neu-tral - a lingv-a fun-da-





# LA ESPERO

HIMNO ESPERANTISTA

En la mondon venis nova sento  
tra la mondo iras forta voko;  
per flugiloj de facila vento  
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta  
ĝi la homan tiras familion;  
al la mond'eterne militanta  
ĝi promesas sanktan harmonion.

\* \* \*

Sub la sankta signo de l'espero  
kolektiĝas pacaj batalantoj,  
kaj rapide kreskas la afero  
per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj  
inter la popoloj dividitaj;  
sed dissaltos la obstinaj baroj,  
per la sankta amo disbatitaj.

\* \* \*

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
komprenante unu la alian,  
la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro  
en laboro paca ne laciĝos,  
ĝis la bela sonĝo de l'homaro  
por eterna ben' efektiviĝos.

L. L. ZAMENHOF

# Gazetoj kiuj raportis pri la Kongreso

## HISPANAJ

A B C, Heraldo de Madrid, El Imparcial, La Libertad, El Liberal, La Voz, El Socialista, El Mundo Obrero, La Asociación de Ferrovianos, La Unión Ilustrada, de Madrid.—Las Noticias, La Vanguardia, El Diluvio, El Día Gráfico, de Barcelona.—El Nervión, de Bilbao.—La Gaceta Regional, de Salamanca.—Revista del Ateneo, de Jerez de la Frontera.—La Libertad, Correo Extremeño, de Badajoz.—Diario de Córdoba, El Defensor de Córdoba, Diario Liberal, La Voz, de Córdoba.—La Vanguardia Balear, La Última Hora, Correo de Mallorca, La Almudaina, de Palma de Mallorca.—El Correo, de Alicante.—El Defensor de Canarias, El Tribuno, La Provincia, de Canarias.—El Cántabro, La Región, La Voz de Cantabria, El Faro, de Santander.—El Ideal Cartayense, de Cartaya.—El Diario de León, de León.—El Correo Gallego, de El Ferrol.—La Razón, de Peñarroya-Pueblonuevo.—Diario de Burgos, de Burgos.—Diario de Cádiz, de Cádiz.—Diario de Huesca, de Huesca.—El Noticiero, La Voz de Aragón, de Zaragoza.—El Carbayón, La Voz de Asturias, Región, La Prensa, de Oviedo.—La Voz, El Cronista, de Málaga.—La Ribera Deportiva, El Galindo, de Baracaldo.—El Liberal, El Noticiero Sevillano La Unión, El Correo de Andalucía, de Sevilla.

## ESPERANTA GAZETARO

**Naciaj.**—La Suno Hispana, de Valencia.—Hispana Esperanto, de Madrid—Kataluna Esperantisto, de Barcelona.

**Eksterlandaj.**—Esperanto, de Génève (Svisujo); Heroldo de Esperanto, de Köln (Germanujo); Germana Esperantisto, de Berlín (Germanujo); Esperanto-Praktiko, de Berlín (Germanujo); Utrechta Esperantisto, de Utrech (Nederlando); Internacia Medicina Revuo, de Lille (Francujo); Esperanto Junularo, de Leipzig (Germanujo).

## VII.<sup>a</sup> HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

---

Sub gvidado de Hispana Esperanto-Asocio kaj organizado de Sevilia Esperantista Grupo, kiel sekvo de la antaŭaj Kongresoj de Barcelono (1920), Zaragozo (1921), Valencio (1923), Bilbao (1924), Kordovo (1925), kaj Madrido (1926).

KAJ

### I.<sup>a</sup> ESPERANTA INTERNACIA LITERATURA KONKURSO

Organizita de la HISPANA ESPERANTO-ASOCIO okase de tiu KONGRESO

EN SEVILLA

DE LA 5.<sup>a</sup> ĜIS LA 9.<sup>a</sup> DE NOVEMBRO DE 1928

---

#### CENTRA KOMITATO en Madrid:

Prezidanto, Sr.<sup>o</sup> Vicente Alonso Sanz; Sekretario, Sr.<sup>o</sup> Julio Mangada Rosenörn; Voĉdonantoj: Sr.<sup>o</sup> Mariano Mojado, Sr.<sup>o</sup> Julián Sosa, Sr.<sup>o</sup> Luis R. Escartin, Sr.<sup>o</sup> Carlos de San Antonio kaj Sr.<sup>o</sup> Pedro Gil.

#### ORGANIZA KOMITATO en Sevilla:

Prezidanto, Sr.<sup>o</sup> Jerónimo de Córdoba; Vicprezidanto, Sr.<sup>o</sup> Enrique de Uriarte; Sekretario-Kasisto, Sr.<sup>o</sup> Carlos Martínez Fernández; Voĉdonantoj, Sr.<sup>o</sup> Cristóbal Rodríguez Pérez, Sr.<sup>o</sup> Fernando Coello, Sr.<sup>o</sup> Luis del Valle, Sr.<sup>o</sup> Miguel Moreno Castillo kaj Sr.<sup>o</sup> Antonio Mármol Cordero.

#### REGIONAJ DELEGITOJ (Laŭ alfabeto vico de regionoj)

Andalucía.—Sr.<sup>o</sup> Franciso Azorín Izquierdo, en Córdoba; Sr.<sup>o</sup> Serafín Baudín Agüero, en Málaga; Sr.<sup>o</sup> Rafael Fiol Paredes, en Jerez de la Frontera (Cádiz), Sr.<sup>o</sup> Francisco García Merchán, en Cádiz.

Aragón.—Sr.<sup>o</sup> Manuel Maynar Barnolas, en Zaragoza; Sr.<sup>o</sup> José Artigas Lasala, en Huesca.

Asturias. —Sr.<sup>o</sup> Eduardo J. de Castro, en Gijón (Oviedo), Sr.<sup>o</sup> Antonio Jiménez Mora, en Oviedo.

Castilla la Nueva.—Sr.<sup>o</sup> Benigno de Luna kaj Sr.<sup>o</sup> Emilio del Barrio, Madrid. Castilla la Vieja.—Sr.<sup>o</sup> Venancio Girao, en Santander; Sr.<sup>o</sup> Luis Flórez González, en Segovia; Sr.<sup>o</sup> Ignacio Casas Riaño, en Burgos.

Cataluña.—Sr.<sup>o</sup> Rómulo S. Rocamora, Sr.<sup>o</sup> José Anglada Prior kaj Sr.<sup>o</sup> Francisco Gorgues Torredelot, en Barcelona.

Extremadura.—Sr.<sup>o</sup> Fernando Redondo, Sr.<sup>o</sup> Rodrigo Almada Rodríguez kaj Sr.<sup>o</sup> Nicolás de Pablo, en Badajoz.

Galicia.—Sr.<sup>o</sup> Andrés Castro, en Pontevedra; Sr.<sup>o</sup> Salvador Oliván, en El Ferrol (Galicia).

León.—Sr.<sup>o</sup> Filemón de la Cuesta, en León.

Valencia.—Sr.<sup>o</sup> Andrés Piñó, Sr.<sup>o</sup> Manuel Caplliure Ballester kaj Sr.<sup>o</sup> Fernando Soler Valls, en Valencia.

Vasconia.—Sr.<sup>o</sup> Eugenio Lunate Pérez, en Baracaldo; Sr.<sup>o</sup> Manuel Elezcano kaj Sr.<sup>o</sup> Luis Otaola Faón, en Bilbao.

Baleares. —Sr.<sup>o</sup> Juan Barceló Andreu, en Palma de Mallorca.

Canarias.—Sr.<sup>o</sup> Antonio Llinás, en las Palmas.

SUPERA DOMESTRECO  
DE LIA REĜA MOŝTO

(REĜA ORDONO)

*Lia Reĝa Moŝto (kiun Dio gardu dum multaj jaroj) plezure decidis kompletigi vian peticion kaj la deziron de la Hispana Esperanto-Asocio, kiun vi inde honore prezidas, akceptante la Honoran Prezidantecon por la VII.<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Sevilla, de la 5.<sup>a</sup> ĝis la 9.<sup>a</sup> de Novembro de la nuna jaro.*

*Laŭ Reĝa Ordono, mi tion komunikas al vi por via ĥono, samtempe esprimante la dankemon de la Reĝo pro la afabla propono.*

*Dio gardu vin dum multaj jaroj.*

*Palaco la 23.<sup>a</sup> de Junio de 1928.<sup>a</sup> = Subskribita de: La Duko de Miranda.*

Al Moŝta Sr.<sup>o</sup> Dr.<sup>o</sup> Carlos M.<sup>a</sup> Cortezo, Ĉiama Honora Prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio Madrid.

---

---

## VII.<sup>a</sup> HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

HONORA PREZIDANTO:

Lia Reĝa Moŝto, Alfonso XIII.

HONORAJ VICPREZIDANTOJ:

Lia Princa Moŝto, Sr.<sup>o</sup> Carlos de Borbón y Borbón, Generalestro de la Regiono Andaluzio.

Lia Kardinala Moŝto, Dr.<sup>o</sup> Eustaquio de Ilundain.

Lia Provincestra Moŝto kaj Reĝa Komizara Moŝto de la Foir-Ekspozicio Ibero-Amerika, Sr.<sup>o</sup> José Cruz Conde.

Lia Deputatestra Moŝto, Sr.<sup>o</sup> Pedro Parias.

Lia Urbestra Moŝto, Sr.<sup>o</sup> Nicolás Diaz Molero.

HONORAJ MEMBROJ:

Moŝta Sr. Carlos M.<sup>a</sup> Cortezo, Prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro kaj Ĉiama Honora Prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio.

Moŝta Sr.<sup>o</sup> Manuel Blasco Garzón, Prezidanto de l'Ateneo de Sevilla.

Moŝta Sr.<sup>o</sup> José Gastalver Gimeno, Prezidanto de la Reĝa Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando, de Sevilla.

Sr.<sup>o</sup> Alfonso Trias de Mellado, Urbkonsilanto de Sevilla.

# DISERVO

---

## UNUA TAGO

LUNDO, 5.<sup>a</sup> de Novembro de 1928

La 5.<sup>a</sup> de Novembro, je la deka matene, la Kongresanaro (200 personoj proksimume) kunvenis en la preĝejo de la Sankta Anĝelo, por aŭdi la solenan kantatan Sanktan Meson kaj la bonegan zamenhofan (de ĉiuj vidpunktoj) esperantan predikon, pri ke «Ĉiuj estaĵoj de la kreitaĵaro havas specialan lingvaĵon por laŭdi la Superaltegan Farinton», predikita esperant-lingve de Pastro Mariano Mojado, Sekretario de Hispana Esperanto-Asocio.

Jen la religia parolado de Sr.<sup>o</sup> Mojado:

## PREDIKO ĈE SEVILLA

---

*Ut cognoscant quia nomen tibi Dominus*

*Tu solus Altissimus in omni terra, Psalm. 82, 17.*

*Por ke oni sciu, ke Via nomo estas la Sinjoro:*

*Vi, la sola Plejaltulo en la tuta tero.*

---

Karegaj gesamreligioj en la internajoj de nia Sinjoro Jezukristo. Rakontas la sanktega libro de Ester, ĉe la Sankta Biblio, ke la reĝo Asuero, dum la tria jaro de sia imperia reĝado, faris grandan festenon por ĉiuj siaj princoj, kaj por siaj servantoj la plej potencaj el Persujo, kaj glorfamaj el Medujo, kaj por la provincestroj, ĉe si, por montri la riĉaĵojn de sia glora regno, kaj la grandecon kaj luksmontrecon de sia povo, dum multe da tempo, nome, dum cent okdek tagoj. Kaj, kiam

finiĝis la tagoj de la festeno, li invitis la tutan popolon, kiu troviĝis en Susa, de la plej granda ĝis la plej malgranda, kaj ordonis, ke, dum sep tagoj, oni pretigu la festenon ĉe la ĝardena korto, kaj ĉe la bosko, kiu estis plantita de reĝa kaj superabundega mano.

Kaj ĉiuflanke pendis ĉielobluaj, kaj blankaj, kaj ĥiacintaj ŝtofoj, fiksitaj per bisinaj kaj purpuraj ŝnuroj, kiuj trapasis tra eburaj ringoj, kaj subtenadis sin sur marmoraj kolonoj. Estis ankaŭ pretigitaj oraj kaj arĝentaj kuŝiloj sur strado, plankumita per smeraldkolora ŝtono kaj per Parosa marmoro, ŝakumita per mirinda diverseco da bildoj. Kaj la invititoj trinkadis en oraj glasoj, kaj la manĝaĵojn oni prezentis en ĉiam diversaj manĝilaroj.

Oni ankaŭ prezentis multekvantan kaj bonegan vinon, kiel decis al la supersufiĉego de reĝo. Kaj ne estis, kiu devigis trinki la netrinke-mulojn; sed, ĉiel estis ordonite de la reĝo, ke unu el la potenculoj prezidu tablon, kaj ke ĉiu prenu laŭvole. La reĝino Eaŝti ankaŭ faris festenon por la virinoj en la palaco, kie kutimis loĝi la reĝo Asuero.

Jen desegnita de la Dia orakolo priskribado de la okazontaĵo en Sevilla dum ĉi tiuj kvin tagoj de gloriplena brilego. Sevilla, la antikvega kaj glorega Sevilla, la perlo de la suda Hispanujo: suverena reĝino de Andaluzio: revinda sultanino de la pasintaj jarcentoj; ĉarma kaj mistera trezoro de ĉiuj mirindaĵoj; vera paradizo de plej delikataj parfumoj; florejo la plej ensorĉinda, kiun neniam povis imagi la fantazio.

Sevilla, je la nomo de sia kavalireca gastemeco; de la mireginta trezoro, kiun entenas ĝiaj ĉarmoj; de la plej parfumita floraro, kiu ornamas ĝiajn kampojn; de la radianta kaj belega suno brileganta sur ĝia ĉielo; de la mistera spirito, kiu animas ĝian ekzistadon; Sevilla, mi diras, je la nomo de sia propra grandeco, kaj de siaj antikvaj gloroj, kaj de siaj Sanktuloj, kaj de siaj saĝuloj, kaj de sia miregiganta riĉeco, kaj de sia mirinda estanteco, kaj de sia enviinda kaj ĉarmiganta estonteco, invitis ne nur la samlandajn samideanojn, kiuj jam kutimiĝis admiri ĝiajn glorojn, sed ankaŭ la esperantistojn de la tuta mondo, por ke ni ĉiuj rigardadu per niaj propraj okuloj la surprizigan evoluadon de urbo benita de la donacemeco de la Dia Providenco; nin invitis por ke ni vidu ĝian kamparon plena da floroj kaj belegeco; ĝian urbon superplena de ĉarmigantaj revoj; ĝiajn monumentojn sanktigitaj per la aŭreolo de la jarcentoj; ĝiajn trezorojn rememorigantaj nevelkigeblajn triumfojn; ĝian potencegan vivforton; ĝiajn pligrandigantajn projektojn;

la civitanajn virtojn de ĝiaj loĝantoj; kaj pli ol ĉio, la esperantistan entuziasmon, kiu vivigas ĝiajn spiritojn, kaj plenigas ĝiajn korojn, kaj brilas en ĝiaj propagandoj, kaj kulminacias en la glorega rebrilo, per kiu ĝi malkovros siajn ĉarmojn, dum ĉi tiuj historiaj tagoj, antaŭ la esploranta kaj miriganta rigardado de la aliĝintoj al la VII<sup>a</sup> Nacia Kongreso de Esperanto en Sevilla.

Ĉi tiu estas la granda festeno, kiun ĝi pretigis al ni, kaj al kiu nin invitis, kaj per kiu nin ebruiĝis; interne de siaj propraj ĝardenoj, plantitaj per la reĝaj manoj de ĝia propra grandeco, kaj kulturitaj per la brileco de ĝia eksterordinara belegeco; en kiuj ni povu admiri ĉiujn nuancojn de la plej parfumhavaj floroj, kiuj disvastigas tra la enaero la plej delikatan aromon; ni sidigu, do, ĉiu sur la sidloko, kiu estas al li destinita ĉe tiel mirinda festeno, kaj plej atente aŭskultu la priskribadojn al ni farotaj pri tiel superbelega spektaklo; sed, por ke ni povu inde kompreni la superaltegecon de tiom da ĉarmoj, ni bezonas la protektadon de la Reĝino de la beleco, kiu de la ĉielo nin rigardadas, kaj kiun ni plej riverencinde salutos per la vortoj de la Ĉefanĝelo, SALUTON, MARIO.

Se ni atente legus, karegaj gefratoj en la internaĵoj de nia Sinjoro Jezukristo, se ni atente legus la sankteĝajn librojn, kiuj estas la rekta esprimado de la Dia penso, ni plejofte eltrovus, ke ĉiuj faritaĵoj de la kreitaĵaro estas invititaj kaj eĉ postulitaj laŭdprkantegi sian Kreinton; kelkefoje, estas la ĉielaj spiritoj la prikantegontoj de la Diaj laŭdoj: Omnis spiritus laudet Dominum = Ĉiu spirito laŭdu la Sinjoron; alifoj, estas la ĉieloĵ de la ĉieloĵ, kiuj, kiel kordoĵ ludataĵ de la fingro de la Superalte Farinto, estas laŭdkantotaĵ suverenana odon: Laudate Eum coeli ꝫcoelorum = Lin laŭdu la ĉieloĵ de la ĉieloĵ: Multefoj, devas esti la suno, la luno, la steloĵ kaj ĉiuj astroĵ de la ĉielspaco la trumpetistoj de la superaltega esprimo de la Dia efikeco, kaj la plejaltigantoĵ de Lia gloro; Laudate Eum sol et luna laudate Eum omnes stellae et lumen = Lin prikantegu la suno kaj la luno, Lin laŭdkantadu ĉiuj steloĵ kaj la lumo: eĉ la akvoĵ, kiuj estas super la ĉieloĵ, estas invititaj kunigi siaĵ harmoniaĵn kantaĵojn al ĉiuj kreitaĵ estaĵoj, por disvastigi tra ĉiuj mondoĵ, kaj surmontrigi ĉiutone la superbelecon kaj brilecon de la Farinto de la granda Kreitaĵaro: Et aquae omnes, quae super coelos sunt laudent nomen Domini = kaj ĉiuj akvoĵ, kiuj estas super la ĉieloĵ laŭdu la nomon de la Sinjoro.

Se ni malsuprenirus al la estaĵoj, kiuj plenigas la terglobon, eĉ unu sola el la faritaĵoj de la Suverena Boneco estas, kiu ne estas invitita kunigi siajn notojn al la universala koncerto de la tuta kreitaĵaro; ĉar la fajro kaj la glacio, la varmo kaj la malvarmo, la roso kaj la prujno, la frosto kaj la neĝoj, la pluvo kaj la hajlo, la noktoj kaj la tagoj, la lumo kaj la mallumoj, la fulmoj kaj la tondroj, la nuboj kaj la uraganoj, la tuta tero estiĝos harmonia ĥoro, toniganta senĉesajn prilauĉkantajn himnojn al la Aŭtoro de la naturo; ĉiuj montoj kaj montetaroj, ĉiuj plantoj kaj arbustoj, ĉiuj fontoj kaj elfluejoj, ĉiuj maroj kaj rivero ĉiuj balenoj kaj fiŝoj, ĉiuj birdoj de la ĉielo, ĉiuj bestoj de la tero, ĉiuj filoj de Adamo, ĉiuj pastroj de la Sinjoro, ĉiuj saĝuloj kaj justuloj, ĉiuj Sanktuloj kaj korhumiluloj, ĉiuj animoj konsekritaj al Dio, ĉiuj estaĵoj senescepte estas invititaj de la tri junuloj de la Babilona forno superlaŭdegi kaj glorigi la ĉiamdaŭran kompatemecon de Dio: Quoniam in soeculum misericordia ejus=ĉar Lia Kompatemeco estas ĉiamdaŭra.

Ĉi tio elpruvas, ke ĉiuj kreitaĵoj havas propran lingvaĵon por elmontri sian propran naturon, kaj la rilaton, kiun ili havas al la Aŭtoro de sia ekzistado; prenu, ekzemple, oran moneron, aŭ arĝentan, aŭ kupran, aŭ diversmetalan; diru al ĝi, ke ĝi parolu, ke ĝi elmontru sian naturon, ke ĝi donu al ni sian muzikgamon, la sonon de la misteraj literoj de sia alfabeto, kaj se ĝi ne estas difektita de ia malpuraĵo, se ĝi havas pura la kondiĉon de sia naturo, se ĝi ne miksiĝis kun iom da skorio nekunigebla kun sia propra perfektaĵo, se ĝi estas senmiksa, ĝi tuj sonoros, konigante al ni sian esencon kaj siajn ecojn, malkovrante al ni la internaĵon de sia naturo, same kiel faras homo kiam li konigas al ni siajn pensojn: tio estas la lingvaĵo de la metaloj, tio estas, kion ni vokus ilia idioma, kies esprimoj enhavas precisan signifon, nekonfuzeblan, kaj realan, ĉar la oro sonoras ore, la arĝento sonoras arĝente, kaj la kupro, kupre.

Se ni prenos nardon, dianton, rozon aŭ ian ajn odorantan floron, kaj ni ĝin invitus, ke ĝi klarigu al ni sian naturon pere de sia propra lingvaĵo, senprokraste ĝi malfaldus la ornamaĵaron de sia beleco, kaj disigus tra la aerspaco sian parfumitan elspiraĵon, kaj malkovrus plej intime sian naturon; tiel, ke, ni neniam povus konfuzi nardon kun dianto, nek dianton kun rozo, ĉar ilia lingvaĵo estas tiel harmonia, klara kaj preciza, ke ili ne permesas ian dubon pri sia esenco, same kiel neniam oni povos konfuzi nardan aromon kun tiu de rozo, aŭ de



dianto; iliaj aromoj estas la diversaj dialektoj de la universala lingvaĵo de la floroj, ĉar ĉiu estaĵo havas sian propran lingvaĵon.

Ordonu al la ĉielfirmaĵo, ke ĝi parolu, kaj ĝi tuj eljetos la tondron; diru al la nuboj, ke ili aŭdigu al ni sian voĉon, kaj momente briligos la fulmon; demandu la aerventegon, kiamaniere ĝi elparolas siajn decidojn, kaj senprokraste ĝi sendos la uraganon, kiu renversos la plej fortajn konstruaĵojn, kaj elradikigos eĉ la jarcentajn Libanajn Cedrojn.

Oni tiel jam povas kompreni, kial la ĉieloĵ kantas la gloron de Dio, kaj la tero estas plenigita de Liaj laŭdoj; kial la kulturaj homoj, la Sanktuloj kaj la saĝuloj, estas metintaj kiel fundamenton de sia grandeco la elserĉadon kaj laŭdkantegadon de tiu mistera Potenco, pleninganta ĉiujn interspacon; kial la Dísenditaj geniuloj ekstaziĝadis antaŭ la rigardado de modestega floro; kial Sankta Aŭgusteno diris, ke Dio estas granda en la grandaĵoj, kaj plejgrandega en la malplejgrandegaĵoj; kial Salomono, la Saĝulo, diras al ni, ke se oni volas lerni la saĝecon, oni devas atente rigardi formikon; ĉar tiel en la ĉielo, kiel sur la tero, aŭ en la maro, aŭ interne de la abismo, ĉiuj estaĵoj havas misteran lingvaĵon por prikantegi la Superaltegan Farinton.

Ĉu ne respondis la steloj, alvokite? Ĉu la maro ne kvietigis siajn furiozigitajn ondojn, aŭdinte la ordonigan voĉon de la Ĉiopovanto? Ĉu la montoj ne ekbruligis siajn ekstremigantajn lumtruojn por lumigi la iradon de la Dia kolero? Ĉu la tomboj ne redonis siajn mortintojn, kiam ili estis postulitaj de la Aŭtoro de la vivo? Ĉu la estaĵoj ne eliris el la neniaĵo, aŭdinte la kreigantan Fiat'on? Tio okazis tial ke kiam oni celas elpruvi la ekzistadon de la plejgrandega Boneco, kaj prikantegi laŭdegantan himnon, ĉiuj estaĵoj estus nesenkulpigeblaj, se ili ne ekpruvus, ke en ĉiuj elmontradoj de la ekzisto, ili sentas la ĉeeston kaj la efikecon de la Plejaltega Kaŭzo.

Kiam la ĉevalo nejas, kaj la azeno azenblekas, kaj la leono blekegas, kaj la kato miaŭnas, kaj la hundo bojas, ili nur eksterigas sian naturon, kaj konstatas laŭdegkante la mirindaĵojn de la Suverena Kreinto; kiam kantas la najtingalo, kaj trilas la kardelo, kaj agordas siajn notojn la merlo, kaj krakas la korvo, kaj pepas la pasero, ili nur laŭtpublikigas ĉiunote de sia mistera gamo la prilaŭdkantojn de la Suverena Farinto. Kion faros la homo ĉeeste de tiomaj kaj tieaj miregindaj instruistoj, lin incitantaj konstati kaj superlaŭdegi la Kreinton de la ĉieloĵ kaj de la tero?

Se li silentas, li estos pli malmola ol ŝtonego, ĉar ĉi tiu elŝprucis sian akvon, kiam ĝi estis postulita de la Moisa bastoneto; li estos pli sensenta ol la kolerigitaj ondoj de la maro, kiuj sereniĝis tuj, sentinte la piedplatojn de la Savinto de la Mondo; li estos pli malobeema ol la suno, kiu haltis, kiam tio estis al ĝi ordonita de la estro de la elektita popolo; li estos forstrekita de la Libro de la Vivo, kie nur estas enregistritaj la obeantoj la voĉon de la Ĉiopovanto. Sed ne, la homo ne silentadis antaŭ la ĉeesto de la Kreinto, nek antaŭ la faritaĵoj de la Diaj manoj; kontraŭe, li multobligadis siajn agadojn por prilauĉkantegi ĉiutonajn laŭdhimnojn al la Superaltega Farinto, kaj utiligis la plumon, kaj la paletron, kaj la penikon, kaj la martelon, kaj la ĉizilon, por seninterrompe ĉiamigi la konstataĵon de la Kreinto de la faritaĵaro; Kion signifas tiuj grandegaj bibliotekoj kun centoj da miloj da volumoj, krom nefineblajn kaj harmoniajn himnojn pri la Dia Prizorgado de la mondo?

Kion elmontras al ni tiu multego da Muzeoj, kie oni enfermas ĉiujn perfektigadojn de la Arto, krom la diversajn nuancojn per kiuj estas tonigitaj la Diaj laŭdoj? Kion esprimas tiuj gigantaj arĥitekturaj konstruaĵoj, kiuj kontraŭstaris la jarcentojn, kiuj mirigegadis ĉiujn generaciojn, kaj suprenaltigas al la steloj de la ĉielo sian fortikegon, krom triumfkanton de la ĉiama sopirado de la homo por sin kunigi al sia Kreinto? Kaj ne kontenta la homo kun ĉiuj ĉi tiuj klopodoj de sia partoprenado en la granda koncerto de la Diaj laŭdoj, li elpensis po miloj lingvojn por ke la honoroj, kiujn oni donas al Dio, estu reprezentitaj en ĉiuj muzikaj nuancoj; kaj, kiam la homa Societo atingis neimagatan progresadon, la Dia Providenco sendis geniulon, kiu elpensis lingvon la plej klara, la plej simpla, la plej superbelega, la plej konforma al la universala aspirado de la rezonanta estaĵo; kaj per tiu lingvo oni kantas ĉiujn Diajn laŭdojn, kaj oni prikantegas la Dian gloron, kaj oni laŭdas la faritaĵojn de Liaj manoj, kaj oni priskribas la grandegecon de la ĉieloj, kaj la iradon de la planedoj, kaj la antaŭenmarŝadon de la jarcentoj, kaj la progresadon de la Societo, kaj la perfektigadon de ĉiuj homaj agadoj, kaj la belecon de la kamparo, kaj la aromojn de la floroj, kaj oni nin invitas por ke ni festu ĉi tiujn grandajn kunvenojn, kaj por ke ni interkompreniĝu per unu sola lingvo, kaj por ke ni amu kaj helpu nin reciproke.

Ĉi tiu estis la alvoko de Sevilla al ĉiuj, kiuj volas partopreni ĉi

tiun pacan militiron de homa liberigado pere de Esperanto, por ke neni sin sentu sola en la mondo, kaj por ke ĉiuj povu partopreni tiun grandan universalan koncerton, kie estas tonumontaj en unu sola lingvo ĉiuj laŭdoj, kiujn amasigis la jarcentoj por prikantegi la Dian gloron. Ni enskribigu niajn nomojn en tiu plejhonorinda Kongreso, kaj tie restadu ili ĉiamigitaj ĝis kiam niaj triumfaj kaj ĝojigaj laŭdoj iru kuniĝi kun tiuj de tiuj feliĉegaj anĝelaj spiritoj, kiuj havis la feliĉon esti por ĉiam laŭdante Dion en la gloro de la ĉielo, kiun mi deziras al ĉiuj, je la nomo de l'Patro, kaj de l'Filo, kaj de l'Sankta Spirito.




# LA KONGRESO

5<sup>a</sup> de Novembro de 1928

Malferma Kunsido

Tiu malferma kunveno estis la ĉefaĵo de la tago, vera impresiga solenaĵo. Je la dekunua kaj duono matene en la riĉe ornamita kunveno de la Centra Konstruaĵo ĉe la Placo de Hispanujo, en Sevilla, okazis la malferma kunsido de la «VII.<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto» sub la prezido de Lia Princa Moŝto kaj Generalestro de la Andaluzia regiono, Sr.<sup>o</sup> Carlos de Borbón kiel Reprezentanto de Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII.<sup>a</sup> Reĝo de Hispanujo, kun la ĉeesto de la Moŝta



Malferma Kunsido en la Centra Konstruaĵo ĉe la Placo de Hispanujo

De maldekstre-dekstre: Sr.<sup>o</sup> P. Christensen, el Chicago; Pastro Jerónimo de Córdoba; Sr.<sup>o</sup> Alfonso Trias, urbkonsilanto; Sr.<sup>o</sup> Nicolás Diaz Molero, urbestro de Sevilla; Sr.<sup>o</sup> Francisco Máñez (jusordenita); Lia Reĝida Moŝto, Infanto Don Carlos; Sr.<sup>o</sup> Manuel Beca, provinca Deputato; Sr.<sup>o</sup> Teófilo Cart, Prezidanto de la Akademio de Esperanto; profesoro Rissom, el Hamburgo; artileria subkolonelo, Sr.<sup>o</sup> Enrique de Uriarte; kaj Sr.<sup>o</sup> Carlos Martínez, Sekretario-Kasisto.

Urbestro de Sevilla, Sr.<sup>o</sup> Nicolás Díaz Molero, kiun ankaŭ kunportis la reprezentadon de la forestanta Moŝta Provincestro Sr.<sup>o</sup> José Cruz Conde, de la provinca Deputato Sr.<sup>o</sup> Manuel Beca, delegito de la Provinca Deputataro kaj de la Urbkonsilanto Sr.<sup>o</sup> Alfonso Trías de Mella-do, honora membro de la Kongreso.

Komencis la Kunsido per sinceraj paroloj de Lia Princa Moŝto, Infanto Don Carlos, deklarinte malfermita la Kongreson je la nomo de Lia Reĝa Moŝto, La Reĝo.

Unue, oni akceptis la Estraro de la Kongreso, konsistanta el Sr.<sup>o</sup> Francisco Azorín, Prezidanto; Sr.<sup>o</sup> Vicente Alonso, unua Vicprezidanto; Fin.<sup>o</sup> María Franco del Capblanco, dua Vicprezidantino; Pastro Mariano Mojado, Sekretario; Sr.<sup>o</sup> Carlos Martínez, Vicsekretario; Fin.<sup>o</sup> Enriqueta Escacena, Kontorino; kaj Sr.<sup>o</sup> Emilio del Barrio, Kasisto.

Post elekto de tiu prezidanta labortablo de la Kongreso, la Moŝta Urbestro de Sevilla, ricevinte la permeson de Lia Princa Moŝto, ekparolis elokventege, laŭdante Lian Reĝan Moŝton, la Reĝon, tial ke li bonvolis esti reprezentata de la Generalestro de Andaluzia Regiono; paneĝirante la efektivan Prezidon de lia Princa Moŝto, kiu tiom multe nin honoris per sia ĉeesto; sin gratulis pro tio ke la esperantista celo, dum la nuna momento, estas tiu sama de tiu de Sevilla, je kies nomo li oficiale salutis la Kongreson; tutkore dezirante ke ĉiuj kongresanoj, reveninte hejmen, alportu kun si feliĉajn rememorojn pri Sevilla; kaj ilin bonveninte kaj gratulinte pro ilia entuziasmo, li promesis al ilian oficialan protektadon por la plena evoluo de la Kongreso, sin montrante tute konvinkita pri la kultura utilo de la internacia helpa lingvo, altideala afero, kies propagandon li per tutaj siaj fortoj apogos, finfinante meze de unuanima kaj longedaŭra aplaŭdado.

Poste, Sr.<sup>o</sup> Beca, je la nomo kaj reprezentado de la Provinca Deputataro salutis la kongresanojn, ilin kore gratulante pro iliaj klopodoj por superaltigi la patrolandan kulturon pere de tiu helpa internacia lingvo, laŭdante la esperantan laboron, kaj dezirante al ili plenan atingadon de la esperanta celo, kiun, la Deputataro konsideris inda je tuta apogo. Li estis tre aplaŭdita.


Sekve, post ĉi tiuj paroloj, Lia Princa Moŝto stariĝis, meze de bruegaj kaj longedaŭraj aplaŭdoj, kaj la tre humila kamplaboristo de Cheste, Sr.<sup>o</sup> Francisco Máñez Sánchez, nia karega pioniro de Esperanto, ordenita de Lia Moŝto, la Ministro pri Laboro, emocioge supreniris la

estradon kaj alproksimiĝis al la Generalestro kiu pendigis de lia brusto la Medalon de la Laboro per kiu la Hispana Registaro premiis la sindoneman homaman laboron de Sr.<sup>o</sup> Máñez. La Generalestro forte cirkaŭbrakis tiun samideanon kaj la multenombra ĉeestantaro entuziasme aplaŭdis.

Tiel finiĝis la oficiala ceremonia malfermo adiaŭdirante komplezeme la Reĝidan Moŝton kun ĉiuj honoroj apartenantaj al lia altegrango, kaj ceterajn aŭtoritatulojn meze de longa aplaŭdado.

La urba muzikistaro plisolenigis tiun malferman kunvenon per ludado de la nacia himno hispana kaj «La Espero».





**Lokaj autoritatuloj kaj oficialaj Delegitoj**

Post la solena malferma Kunsido en la Kunveno de la mirinda Placo de Hispanujo

# PROTOKOLARO

## UNUA TAGO

LUNDO, 5.<sup>a</sup> de Novembro de 1928

### AKTO UNUA

Sekve de la malferma Kunsido, en la sama kunveno post la foriro de la aŭtoritatuloj kaj okupante sian lokon la Estraro de la Kongreso, Sr.<sup>o</sup> Francisco Azorín, kiel prezidanto de la Kongreso malfermis la laborkunvenon.

La Sekretario konstatas la aliĝon de cirkaŭ KVARCENT efektivaj aliĝintoj enkalkulinte inter ili Asociojn, Grupojn, Korporaciojn; kaj pli ol KVINDEK spiritaj aliĝintoj. Ankaŭ legis la Sekretario salutleterojn, telegramojn redaktitaj esperante, alvenintaj ne nur de kelkaj enlandaj provincojn, sed ankaŭ de eksterlando.

Inter ili ni citas:

**TELEGRAMOJ RICEVITAJ:** De s-roj Espel, Plaza kaj Alsina, el Málaga; de s-roj Jung kaj Berger (Heroldo de Esperanto) el Köln (Germanujo); de s-ro Zarzosa, el Vitoria; de s-ro Fiol, el Jerez de la Frontera; de s-ro Gorgues, el Barcelono; de s-ro Luis Mangada, el Madrido; de s-roj Elezcano kaj Otaola, el Bilbao; de s-ro Naranjo, el Jerez de la Frontera; de s-ro Rubio, je la nomo de la samideanoj el Peñarroya; de s-ro Botella, je la nomo de la esperantistaro el Valencio; kaj de la Esperanta Grupo, el Bilbao. «Oni devas konstati ke ĉiuj alvenintaj telegramoj estis esperante redaktitaj».

**SALUTLETEROJ RICEVITAJ:** De la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, el Genevo (Svisujo); de la Latvaj Esperanto geinstruistoj, el Riga (Latvio); de la Esperanta Grupo «Fraternidad Republicana» el Tarrasa; de s-ro Sebastián Chalor, el Tarrasa; de La Unión Comercial, el Baracaldo; de la Esperanta Grupo «Nova Stelo», el Barcelono; de la Grupo Esperantista «Lumon», el Tarrasa; de la Sociedad de Inquilinos «La Justicia», el Mataró; de la Esperanta Fakto de la «Mutualidad Cultural y Cooperativista», el Tarrasa; de s-ro L. Plaza, el Madrid; de s-ro Delfi Dalmau, el Barcelona; de Kataluna Esperanta Federacio, el Barcelona; de la Fremduloŝicejo, el Budapeŝto (Hungarujo); de la Esperanto Association of North America; de s-ro Juan Barceló, el Palma de Mallorca; de



fino María Franco, el Madrido; de s-ro G. Alomar, el Palma de Mallorca; de s-ro José Artigas, el Huesca; de la Diputación provincial, el Badajoz; de la gazeto «Heroldo de Esperanto» el Köln (Germanujo); de la Oficiala Austria Esperantogazeto, el Korneuburg (Austrio); de la Loka Kuratoro Komitato, el Wien (Austrio); de la Austria Esperanto Delegitaro, el Bisamberg bei Wien (Austrio); del Ateneo Popular, el Gran Canaria; de la Sociedad Económica de Amigos del País, el Málaga; de la Sociedad de Ahorro y Mutualidad «La Fraternal», el Málaga.

Poste, nia kara prezidanto de la Esperanta Akademio, Profesoro Teofilo Cart, el Paris, sin turnis al la aŭskultantaro salutante kaj dankante emocie la hispanajn samideanojn, kiuj liveris al li okazon por ĝui plene en zamenhofa sento la landon de Don Kihoto, dirante ke jam de antaŭ pli ol tridek jaroj, li bataladis por konservi la unuecon de la lingvo de nia Majstro Dr.<sup>o</sup> Zamenhof kaj ke li venkis ĉiujn kontraŭulojn, kvankam li estis nomita Kihoto, rimarkante ke li same kiel la Kavaliro, ankaŭ kelkokaze estis celo de atakoj kaj moko; sed tamen li ne laciĝis pro tia laboro kiu donos al ni la triumfon.

Sekve, parolis la simpatia usona samideano Sr.<sup>o</sup> Parley Parker Christensen, el Chicago, kiu sincere frate salutis la Kongreson je la nomo de Esperanto Asocio de Norda Ameriko kaj sin montris plengoja kaj espereme antaŭ la aranĝo de nia Kongreso kaj la observado pri la fervoro, entuziasmo kaj fideleco nia al la lingvo Esperanto ĉe la plej lojala fundamenteco.

Germana samideano, inĝeniero Sr.<sup>o</sup> Jozefo Menĝele el Fürth (Bavarujo) esprimis siajn korajn salutojn gratulante la alestantojn kaj laŭdis Hispanujon, tial ke ĝi restis neŭtrala dum la Granda Mondmilito, aldona ke Esperanto estas la solvo de ĉiuj sociaj problemoj.

Profesoro Rissom, el Hamburgo salutis la Kongreson, dezirante al ĝi tutplenan sukceson.

La Prezidanto de la Estraro Sr.<sup>o</sup> Azorin, vidante ke F-ino María Franco ne povis ĉeesti la Kongreson, proponis F-inon Sara Maynar por anstataŭi ĝin ĉe la Viceprezidanteco, kaj akceptite unuvoĉe kaj meze de simpatia aplaŭdado, Fin.<sup>o</sup> Sara Maynar okupis sian lokon en la prezidantabla.

Poste, la Sekretario de H. E. A. Sr.<sup>o</sup> Mojado legis Raporton de la laboroj efektivigitaj de la Societo dum la pasinta dujaro, plenumo de la 5.<sup>a</sup> artikolo de la statutoj de la Hispana Esperanto-Asocio, elpruvante la rimarkindan progreson de nia Asocio kvinobliginta dum tiuj du jaroj kaj renaskanta la movadon en multaj lokoj. La Kongresanaro

kun eksterordinaraj ĝojesprimoj kaj per unuanima aklamado aprobis la raporton.

La aklamado al la laboro farita de la Direktanta Komitato de H. E. A. vidigis klare la plenan sukceson de la Kongreso meze de frata, zamenhafa kunagado, en plena konkordo kaj entuziasmo.

Post la legado de tiu raporto Sr.<sup>o</sup> Azorín fermis la kunsidon je la dektria kaj tri dek minutoj.

## D U A   T A G O

MARDO, 6.<sup>a</sup> de Novembro de 1928

### AKTO DUA

En la Kunvenejo de la Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando, ĉe Sevilla, je la dekoka de la 6.<sup>a</sup> de Novembro, kaj sub la prezido de Sr.<sup>o</sup> Azorín, oni malfermis la duan kunsidon de la Kongreso, ĉeeste de proksimume ducent samideanoj, el ĉiuj regionoj de Hispanujo kaj de la jam aluditaj kvar fremdaj samideanoj; oni ekkomencis legante la Akton de la antaŭa kunsido, kiu estis unuanime aprobata.

Poste, Sr.<sup>o</sup> Vicente Alonso, Prezidanto de H. E. A. diris: Tre ĝoja estas por ni la hodiaŭa tago: Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII (Dio lin gardu) akceptis la prezidantecon honoran de nia Kongreso kaj Li reprezentigis sin en la persono de Lia Reĝida Moŝto Carlos de Borbón; per tiel rimarkinda favoro ni estas tre honoritaj kaj dankas Lin el la profundo de nia koro. Ankaŭ ni estas dankaj al Lia Reĝida Moŝto Generalo Regionestro, al Liaj ekscelencaj Moŝtoj Ĉefepiskopo-Kardinalo, Provincestro, Deputitarestro kaj Urbestro tial ke ili akceptis honorajn Vicprezidantecojn. Dankon merita segale la honoraj membroj ekscelencaj Moŝtoj Dro. Cortezo, Blasco Garzón, kaj Gastalver Gimeno, kaj Sr.<sup>o</sup> Trias de Mellado pro servoj faritaj al nia afero. Ne malpli dankaj ni estas al la urbo Sevilla kiu tiel bonan akcepton preparis al la Kongresanoj. Ni ne forgesu la Centran Direktantan Komitaton nek la Regionajn Delegitojn kiuj multe laboris varbante anojn al la Kongreso kaj farinte propagandon pri ĝi. Apartan mencion meritas la Sekretario de la Organizanta Komitato de Sevilla pro la grandaj penoj kiujn li sin

altrudis por prepari al ni la belan Kongreson kiu donos al ni la okazon ĝui kaj admiru la belegaĵojn de Sevilla kaj espereble estas ankaŭ ke en ĉi tiu Kongreso, se ni laboras konkorde kaj harmonie ni metos la bazojn sur kiuj niaj hispanaj esperantistaj organizaĵoj elstaros firmaj kaj senŝancelaj ĝis ni atingos nian komunan celon.

Kiam antaŭ du jaroj, ĉe la ferma kunsido de la VI.<sup>a</sup> Kongreso de Esperanto de Madrid mi atentigis la ĉeestantaron pri la meritoj de Sr.<sup>o</sup> Máñez, kiel senlaca kamlaboristo kaj apostolo esperantista, kaj mi diris ke, se mi havus povon, mi proponus lin por ke oni aljuĝu al li ian «ordenon». Jam Sr.<sup>o</sup> Máñez estas dekoraciita per la Medalo de la Laboro; jam estas realaĵo, kio ŝajnis nur sonĝo, dank' al konstanteco, kunlaborado kaj kunagado de la hispanaj geesperantistoj. Tiu agmaniero servu al ni kiel ekzemplo sekvota en la multaj komunaj problemoj esperantaj solvotaj de ni. Mi esperas ke mi esprimas la penson de ĉiuj ĉitieaj ĉeestantoj gratulante Sr.<sup>o</sup> Máñez pro la dekoracio ricevita kaj cirkaŭbrakante lin je la nomo de la hispana esperantistaro.

Sekve li konstatas ke la sufiĉe grandnombra Kongresanaro garantias la sukceson kaj montros je maniero nerefutebla la gravecon kiun havas jam en nia lando la afero esperanta.

Laste li prilaudegis la laboron de la nin helpintoj por la preparado kaj evoluado de la Kongreso kaj ĉefe li superlaudegis la eksterordinaran laboron efektivigita por feliĉe sukcesigi la Kongreson, plejentuziasme apartigante la tri nelacigeblajn samideanojn, reprezentataj per po unugranda litero M. (Mangada, Mojado kaj Martínez) kiuj laboradis favorege al la plej bona organizo de la VII.<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilla.

Sr.<sup>o</sup> Alonso citis kelkajn vortojn de la elpensinto de Esperanto, nia kara Zamenhof, pri la utilo de la Kongresoj, tiel Naciaj kiel internaciaj, por la unueca elparolado de la lingvo, kaj aliajn vortojn de l'Profesoro Cart, Prezidanto de la Esperanta Akademio, pri la unuformeco de la lingvo, finfinante sian entuziasman paroladeton meze de aplaŭdoj de la ĉeestantaro.

Post tio oni legis aliĝantan leteron de l'Ateneo de Zaragozo, per kiu ĝi nomis Sr.<sup>o</sup> Maynar sia reprezentanto ĉe la Kongreso, kaj, dirinte la Prezidanto de la Estraro ke konvenas ke parolu la Gedelegitoj de la Grupoj kaj Korporacioj, donis la parolpermeson al la beleta samideanino, naŭjara infanino, Amparito Remohí, reprezentantiĝo de la Grupo

de Cheste, kiu, parolante per dolĉa kaj anĝela voĉo, diris, ke ŝi lernis Esperanton de la tago de sia naskiĝo, kaj stimulis ĉiujn por ke ili lernu tiel facilan lingvon, ĉefe, ŝi instigis la virinseksan al alprenado de Esperanto por tutplene fratigi ĉiujn homojn, ĉar esperantistino nur povas esti perfekta fratino, fianĉino, edzino kaj patrino; kore kaj per flua esperanta parolo salutis la Kongreson nome de la Chestanoj, kaj per la tuta forto de sia infanina gorgo, meze de unuanima kaj longedaŭra aplaŭdado, finmetis sian salutadon per vibranta kaj sonora «Yivu Esperanto!... kiu estis redirata de ĉiuj alestantoj. Ha, kia granda emocio, pro la diroj de la knabineto, vidiĝis sur ĉiuj vizaĝoj!

Sr.<sup>o</sup> José Anglada Prior, reprezentanto de l'Grupo «Esperanta Auroro», de Barcelono, salutis kaj diris, ke lia Grupo, konforme al sia nomo, anoncas la tagiĝon de Esperanto, kaj senĉese laboros ĝis kiam la esperantista Suno brilos per tuta sia tagmeza heleco.

Sr.<sup>o</sup> Alberto Díaz, reprezentanto de la Grupo de Bilbao, salutis la Kongreson nome de sia Grupo, rimarkigis, ke Esperanto progresadas laŭ la kultura progresado de la Societo; ke la bezoneco de la internacia helpa lingvo eksentiĝas, kiam oni eliras el la patrolanda lingvatingo; ke la plej civilizitaj landoj estas la plej progresemaj pri Esperanto, pro kio en Afriko, kie li loĝas, prosperas tre malmulte kaŭze de la senkulturo de ĝiaj loĝantoj, sed ke, malgraŭ ĉio, Esperanto estas jam disvastigata tra la tuta mondo.

La samideano Antonio Carrasco, plena de entuziasmo kaj facilprime salutis la Kongreson je la nomo de l'Grupo «Gajeco kaj Laboro», de Tocina.

Sr.<sup>o</sup> Carlos de San Antonio, kiu ankaŭ kunportis la reprezentadon de Dr.<sup>o</sup> Cortezo, glora kaj ĉiama honora Prezidanto de Hispana Esperanto Asocio, salutis je la nomo de «El Siglo Médico», kiu faradas bonegan propagandon pri nia celo inter la hispanaj kuracistoj, kaj deziris por la Kongreso feliĉan sukceson.

Sr.<sup>o</sup> Rocamora, reprezentanto de «Las Noticias» de Barcelono, kaj de l'Grupo «Fajro», diris ke lia Grupo kunportas la fajron en la koro por bruligi la bruligotajon; salutis nome de la Direktoro de «Las Noticias» per kies ĵurnalo oni faras eksterordinaran esperantistan propagandon; ke ĉi tiu Kongreso estas la rezultato de la laboro komencita de ili en tiu de Barcelono, helpitaj de Sroj. Maynar kaj Mangada, kiuj savis la novenaskiton, kiu estus mortinta sen ili; ke oni devas sopiradi

pri la grandaj Kongresoj, al kio kontribuis Sroj. Azorín kaj Martínez, kiujn ni devas kore ĉirkaŭbraki; ke estas necese studi la celon de ĉi tiuj Kongresoj, ĉar el ĉi tiu regiono eliris la karabeloj por la elkovro de la Nova Mondo, kaj de ĉi tie devas eliri Esperanto por sin enradikigi en ĉiuj nacioj.

La samideano Vicente Moreno, Profesoro de Esperanto ĉe la Madrida Popoldomo, salutis la Kongreson per flua elparolado nome de siaj socialistaj kamaradoj, dezirante al la kunvenantaro fruktodonan laboron.

Sr.<sup>o</sup> Manuel Maynar, reprezentanto de l'Grupo «Frateco», de Zaragozo, intencis saluti la Kongreson sufiĉamplekse, sed, rilatigante la diriton de la fraŭlineto kaj tion de Sr.<sup>o</sup> Rocamora, li nur enradikigas la signifon de sia Grupo, petante al ĉiuj Fratecon, kiel Sroj. Rocamora kaj Cart, kaj finfinis per amplena ĉirkaŭbrako por ĉiuj, rememoriginte, kiel reprezentanto de l'Ateneo de Zaragozo, ke Sr.<sup>o</sup> Royo Vilanova ilin decidplene helpis por la realigo de la Kongreso efektivigita en la ĉefurbo de Aragón.

Sr.<sup>o</sup> de Pablo salutis la Kongreson nome de «l'Grupo Esperantista Pacense», same kiel Fraŭlino Lucrecio salutis je la nomo de l'Grupo «Antaŭen» de Madrid, ambaŭ dezirante, ke la kunsidoj de l'Kongreso atingu plenan sukceson.

Sr.<sup>o</sup> Luis García Fernández, reprezentanto de l'Grupo de Oviedo, salutis la Kongreson kun surpriziga entuziasmo, dezirante al ĝi mil bondezirojn, kaj per vibranta kaj sonora voĉo, facila kaj fluanta esprimo, salutis ankaŭ je la nomo de la Oviedprovinca Deputitaro, petante je ĝia nomo la efektivigon de la VIII.<sup>a</sup> Kongreso en la ĉefurbo de Asturias, en Oviedo, priskribante grandtrajte la superbelegajn mirindaĵojn, entenataj en la Princlando; kaj liaj lastaj vortoj estis senaŭdigataj per bruega kaj longedaŭra ovacio.

Sr.<sup>o</sup> Máñez, reprezentanto de Cheste kaj ĉirkaŭajaj vilaĝoj, salutis je la nomo de siaj multenombraj reprezentatoj; diris, ke li ne estas inda je la ordeno al li donita, kaj li opinias ke tio okazis tial ke li estas la plej modesta el la hispanaj esperantistoj, finmetante meze de longedaŭraj aplaŭdoj.

Sr.<sup>o</sup> Mangada salutis nome de Hispana Esperanto Instituto, kaj parolante grandemocie, diris: Ne aplaŭdadu min, sed la elpensinton de Esperanto; la infanino de Cheste donis al ni la modelon vin invitante

por ke vi studu Esperanton, kaj por ke ni amu unu la aliajn, kunsentante en la unueco de la sento: ĉiuj virinoj kaj precipe la patrinoj devas lernigi al siaj gefiloj Esperanton; li salutis la fremdulojn dezirante al ili ĝojplenan revenon al iliaj hejmoj, kun plezurigaj impresoj de ilia restado inter ni, kaj, dirinte ke la Instituto havas gravan estonton, kaj ke ĝi grandefike helpos gravajn interpretojn, finfinis per kora ĉirkaŭbrako por ĉiuj samideanoj.


Senprokraste, oni malfermis diskutadon pri la punktoj de la fiksita programo. Oni aprobis la unuan punkton pri la kotizo al H. E. A. dum la lastaj monatoj de la antaŭa jaro, ne devige, sed kiel konvene por la plej bona evoluo de la Asocio kiu havas neprajn devojn al la ĝenerala esperantista movado, al la Naciaj Kongresoj kaj al la deviga nacia propagando; Sr.<sup>o</sup> Almada aldonis, ke la kotizo valoras por la tuta jaro, kaj post kiam Sr.<sup>o</sup> Escartín konfirmis la ideon, ĝi estis aprobata.

Oni ankaŭ aprobis la duan punkton kun la klarigo, ke la aliĝo de la Grupo al la Hispana Esperanto Asocio devas esti memvola kaj opa, same kiel la kotizo, fiksante kiel minimuman kotizon tiun saman, kiun pagas iu ajn individuo por esti membro de H. E. A.

La tria punkto estis aprobata, konstatinte ke la formado de Grupoj ne estas deviga, sed konvena por la plej bona organizado de nia esperanta movado, kaj ke oni bezonas almenaŭ dek individuojn por starigi Grupon laŭ nundeviga leĝo.

Pri la kvara punkto ne ŝajnis konvene fiksi templimon por respondi la oficialajn komunikaĵojn, kun malkonsento de Sr.<sup>o</sup> Ludoviko Campos: sed, se oni ne respondas, kaj la respondo estas urĝa, devas la Direktanta Komitato decidi ĉiuokaze, ĉar ĉi tiu punkto ŝajnas prieduka kaj bonsenta afero; la kunsido finiĝis je la dudeka kaj dudekkvin minutoj.

Rimarkinde estas konstati la miron de Sr.<sup>o</sup> Cart kaj fremdaj samideanoj, sin elmontrantaj entuziasme, pro la konstanta uzado de Esperanto, pro la bona kaj klara prononcado kaj esprimmaniero, dum la diskutado, alvenante al interkonsento kaj konkordo por bono de la komuna afero.



Unu el la oficialaj Kunvenoj de la Kongreso

# TRIA TAGO

MERKREDO. 7.<sup>a</sup> de Novembro de 1928

## AKTO TRIA

En la kunvenejo de la Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando, ĉe Sevilla, je la dekoka kaj tridek minutoj de la 7.<sup>a</sup> de Novembro de 1928.<sup>a</sup>, kaj sub la Prezido de Sr.<sup>o</sup> Francisco Azorín, oni malfermis la trian kunsidon ĉeeste de proksimume ducent kvardek samideanoj, kaj post la legado de la antaŭa Akto, kiu estis aprokata, oni donis la parolon al Sr.<sup>o</sup> Mangada, kiu, elmontrante la grandan esperantistan movadon, kiu evoluigadas en la Astura Princlando, apogis la peton farita de la reprezentanto de l'Grupo de Oviedo, nome de la provinca Deputataro, por ke la proksima Nacia Kongreso de Esperanto efektiviĝu en la Ĉefurbo de l'Princlando de Asturias, en Oviedo; Sr.<sup>o</sup> Luis García Fernández rimarkigis, ke estas tre entuziasmaj kaj agemaj Grupoj en Oviedo, Gijón, Grado, Trasona, k. t. p., kaj ke la Provinca Deputataro estas preta subteni nian agadon ĉiajelemente por la triumfo de nia celo, kaj ke ĉiuj niaj Ovedaj samideanoj plejentuziasme deziras ĝian okazigon, kaj, post la klarigo de la Prezidanto de la Estraro, pri ke la jaro kaj la tago devas esti fiksita de la Direktanta Komitato de Hispana Esperanto Asocio interkonsentinte kun la direktantoj de la Ovedia movado, meze de varmega kaj longedaŭra aplaŭdado, oni unuanime aprobis la proponon.

Post tio, oni nomis Srojn. Campos kaj Anguita por la revizado de la bilanco de la Asocio kaj de l'Instituto, kiel ordonas la Regularo.

Sr.<sup>o</sup> Rocamora proponas, ke oni gratulu la Direktoron de «Las Noticias» de Barcelono, kiu tiel malavare metas je lia dispono la kolumnojn de l'ĵurnalo por senlima propagando de Esperanto; oni proponis laŭdgratulon por Sroj. Rocamora, Anglada kaj Gorgues pro ilia entuziasmiganta propagandado per la dirita ĵurnalo, kaj, tial ke estas faritaj similaj propagandadoj per «El Socialista», «Unión-Radio», «La Libertad», kaj «El Liberal» aliaj de Sevilla k. t. p., oni aprobis dankesprimon



por la Direktoroj de ĉiuj ĵurnaloj nin favorintaj per la metado de iliaj kolonoj je la dispono de nia idealo.

Pri la kvina punkto oni interkonsentis, ke oni devas honori la memoron de Sr.<sup>o</sup> Codorniu dum la estonta internacia Kongreso okazigota en Madrido.

Pri la sesa punkto oni decidis, laŭ propono de Sr.<sup>o</sup> Mangada, la fondon de esperantista stelo (kvazaŭ ordenon de la Honora Verda Stelo), kiu povus taŭgi por ĉiujare premii samideanon, kiu plej gravajn meritojn povus prezenti, faritaj favore de nia komuna celo; kaj oni devas fari specialan regularon por la aljuĝo de tiel honorigan distingilon.

Estis senklarige kaj sendiskute aprobita la sepa punkto pri la kolektigo de Aktoj kaj Protokoloj de ĉiuj antaŭaj Kongresoj, kaj ilia sendo al la Sekretariejo de Hispana Esperanto Asocio por formi Libron de Aktoj de la Kongresoj.

Pri la oka punkto, post la legado de la propono prezentita de Sr.<sup>o</sup> Luis Campos, oni decidis nomi Komitaton, kiu studos kaj reguligos ĝin; Sr.<sup>o</sup> Azorín aldonis, ke la sama Komitato taŭgu por studi kaj reguligi la projekton de Sr.<sup>o</sup> Anglada, la esperantistan stelon kaj la proponon de Sr.<sup>o</sup> Benigno de Luna; ĉiuj estis samidee, ke oni devas celi la pligrandan simpligon de nia esperantista movado.

Pri la hispana esperantista jarlibro, oni decidis, ke estos tre konvene ĝia publikigado, kiam oni havos tempon kaj monon, lasante la aferon por plej favoraj cirkonstancoj.

Post kiam parolis Sroj. Martínez, Campos, kaj Mangada, kaj intervenis Sr.<sup>o</sup> Cart dirante, ke tre baldaŭ aperos tutesperanta vortaro, kaj la interveno de Sr.<sup>o</sup> Anglada pro la vortaro de li publikigita, oni konstatis la urĝon de kompletaj vortaroj, kaj oni decidis stimuli la plenepruvitan agemecon de Sr.<sup>o</sup> Inglada por ke li faru novan vortaron, ĝin kompletigante laŭbezone, konsciante la tutan evoluon atingita de Esperanto.

Pri afero de la gazeto por publikigi ĉion koncernanta la Asocion, Sr.<sup>o</sup> Mangada klarigis tion, kion li proponis, donacante al la Asocio la necesajn ekzemplerojn intersanĝe de tri pesetoj jare al li donitaj de la memvolaj abonintoj; ne donacante ĝin tute, ĉar li ne havas monon por ĝin publikigi. Sr.<sup>o</sup> Aguirre parolis metante je la dispono de la Asocio kaj de l'Instituto sian presilon, kaj, post kiam oni lin dankis pro la donacitaĵo de li farita al la Instituto, donacante al ĝi la tutan eldo-

non de la Demandaro kaj Respondaro de li eldonita (2.000 ekzempleroj), oni decidis lin nomi Protektanta Membro de l'Instituto. Sr.<sup>o</sup> Escartindeziris, ke oni ne pli grandigu la jarabonon, kaj proponis, anstataŭ la Gazeton, la publikigon de Cirkuleroj; Sr.<sup>o</sup> Almada proponis la daŭrigon de «Hispana Esperanto», kaj tiel estis fine decidata, malfermante la kunsidon je la dudeka kaj tridek minutoj por ĝin daŭrigi je la dudekdua horo.

En la sama loko, kaj je la fiksita horo, sub la sama Prezidanteco, oni daŭrigis la kunsidon; Sr.<sup>o</sup> Mangada insistis pri kiom danĝere estus por H. E. A. havi oficialan organon, ĉar mankas al ĝi monsumo por tio; kaj estus plej konvene utili la donproponon de memvolulo; Sr.<sup>o</sup> García Aguirre donproponas sian presilon por tiu celo, estante tre aplaŭdata. Sr.<sup>o</sup> Naranjo, de Jerez de la Frontera, salutis la Kongreson, kaj demandis, ĉu la presado devas esti esperante, aŭ hispane; pri kio parolis Sroj. Mangada, Almada, kaj Martínez, ciuj laŭ propra vidpunkto pri la dirita afero; Sr.<sup>o</sup> Alonso diris, ke, se la Gazeto ne estas estonta oficiala, oni devas lasi la aferon kaj ĝian disdonadon al la elekto de la memvolulo, kiu tion publikigos; Sr.<sup>o</sup> Escartín proponis, ke oni devas publikigi ĉiujn donatajn cirkulerojn informigajn pri la esperanta movado; oni interkonsentis ke per la Gazeto, ĉu de memvolulo, ĉu oficiala, estas sufiĉe, ĉar oni povas utili ĝiajn kolonojn. Oni fine metas por voĉdonado, Ĉu H. E. A. devas posedi propran oficialan Gazeton kaj oni unuanime decidis, ke ankoraŭ ne estas oportuna dato por tio.

La nomita Komitato por la revizio de la bilanco donas sian tutan aprobon; diras, ke la bilanco estas perfektorde, kaj la kalkuloj kun plena klareco; ke estas rimarkinda la malgrandega sumeto ŝarĝita pro la poŝtaj elspezoj malgraŭ ke la Sekretario skribis pli ol okcent leterojn ĉe sia korespondado kun la membroj de la Asocio, kiel li legis en la Raporto de li prezentita antaŭ la Kongreso; ke oni devas doni al la Estraro de H. E. A. dankesprimon pro tiom grava ŝparado proponante la aprobon de la bilanco kun laŭdesprimo pro la aĝemeco, laboremeco kaj kompetenteco de la Direktanta Komitato de la Estraro kaj de ĝia Kasisto; oni decidis tiel kun longedaŭraj aplaŭdoj.

Oni aprobis proponon pri ke en oportuna tempo oni faru petskribon al la Ministro de Publika Instruado por la oficiala enkonduko de Esperanto; oni ankaŭ kaj samsence aprobis alian, prezentita de Sr.<sup>o</sup> Rocamora, petante ke la Registaro kunvoku Internacian Kunvencion por

ke oni akceptu Esperanton kiel internacian helpan lingvon; sed oni devas atendi oportunan momenton, laŭ propono de Sr.<sup>o</sup> Borrell, de Barcelono. Laŭpropono de la samideano Sr.<sup>o</sup> J. Borrell Soldevilla, de Barcelono, kaj konsciante la dekreton de la 1.<sup>a</sup> de Aŭgusto de 1928.<sup>a</sup> pri universitatstudaj reformoj oni decidis peti al Ministro klarigesprimon laŭsence ke inter la akceptitaj lingvoj por la eniro en la superajn studojn, Esperanto povas esti unu el ili.

Sr.<sup>o</sup> Mangada diris, ke, tial ke estas prezentita en Antverpeno propono por laŭebla monhelpo al la Akademio de Esperanto per la Naciaj Societoj, kaj aprobita, li proponis ke oni destinu jare kvindek pesetojn tiacele, kaj, tial ke la Akademio estas teknika organo, kaj ni jam starigis en Hispanujo Hispanan Esperanto-Instituton, por malŝarĝi je tia elspezo la Asoĉion, estus konvene ke la Instituto zorgu subteni tian monhelpo, kaj oni interkonsentis tiel.

Sr.<sup>o</sup> Escartín diris ke estas konvene publikigi novan eldonon de la broŝuro ¿Qué es el Esperanto? kaj de la ŝlosilo de Esperanto, de Kordovo. Oni opiniis kaj unuanime decidis la kiel eble plej baldaŭan reeldonon de la libro.

Oni decidis dankesprimi al Sr.<sup>o</sup> Martínez pro la brilegeco de la Literatura Festo en kiu estis malŝparigita vera entuziasma sufiĉego, ĉu pro la taŭgtrafitaj komparoj inter la heroeco, la kultureco kaj la beleco, faritaj de la subtenanto, kaj kiuj eksplodigis longedaŭrajn huraojn kaj bruegajn aplaŭdojn ĉu pro la brilegado elmontrita de la revindaj kaj ĉarmaj junulinoj kiuj faris la kortegon de la simpatia kaj ĝentilaŭplena reĝino sub la protektado de graciaj kaj luksegaj standardoj de la diversaj esperantistaj Grupoj de Hispanujo; ĉu pro la disdonado de la Diplomoj, kiujn elegantece kaj majeste la entronigita kaj miregiganta reĝino enmetadis en la manojn de la premiitaj samideanoj, kaj ĉu pro la trafaj rimarkoj faritaj de la premiito Sr.<sup>o</sup> Mangada, parafrazante unu el siaj premiitaj verkoj.

Alian dankemon al la entuziasmaj samideanoj aliĝintaj al la Kongreso, kiuj estis proksimume KVARCENT, enkalkulante inter ili la sesdekkvin oficialajn Korporaciojn, privatajn Societojn kaj esperantistajn Grupojn, kiuj per siaj aliĝo kaj monhelpo estis kontribuintaj al plej granda brileco de la glora Kongreso de Sevilla.

Ankaŭ oficialan dankesprimon al «Besoy» pro la 20.000 ekzemplerajn eldono de la Hispana ŝlosilo; alian al Sr.<sup>o</sup> Azorín pro la dona-

citaj mil ekzempleroj de la dirita ŝlosilo por ilin disdonadi ĉe la Kongreso, kaj ĉe la Foraj Ludoj en la Teatro Lloréns.

Alian tre specialan kaj gratulplenan al la Sevilla urbestro pro la kunhelpado kaj helpasisto donitaj al la Kongreso, pro la bonega eldono de la enesperanta gvidlibro de Sevilla, disdonita inter la kongresanoj, kaj precipe pro la lukseGPLena akceptado, kiun la urbestro Moŝto faris al la kongresanoj, kaj pro la sukabundega lunĉo per kiu ĝi ilin regalis post la elokventega elparolado de lia urbestro Moŝto de Sevilla, kiu superlaŭdegis la entuziasmon de la esperantistoj kaj la estonton de Esperanto, ripetante sian decidon favori ĝian propagandon por ĉiuj rimedoj de sia atingo, ĉar tio kontribuos superlaŭdegi kune la projektitan Ekspozicion de Sevilla; al kio respondis Sr.<sup>o</sup> Azorin, Prezidanto de la Kongreso, rimarkigante ke, kvankam modestaj en siaj pretendoj, la esperantistoj reprezentas idealon, entenanta ĉiujn aspektojn de la homa kulturo, kaj tre baldaŭ oni vidos kronitaj aliajn klopodojn, kiam la tuta homaro, forgesinte siajn antikvajn malpacojn, ĉirkaŭbraku sin pace kaj frate pere de Esperanto; alian dankemecon por la hispana gazetaro ĝenerale pro la publikigado de esperantistaj informoj, kaj krome, sinceran kaj specialan dankesprimon por la esperantaj gazetoj «Esperanto», «Heroldo de Esperanto» kaj ĉefe al «Hispana Esperanto», kiu dum la tuta jaro 1928<sup>a</sup> propagandadis la Kongreson.

Ĉesinte de siaj oficoj la Estraro, laŭ la artikolo 3.<sup>a</sup> de la Regularo, ĝi prezentis la eksigon de ĉiuj membroj, kiu ne estis akceptata, ĉar oni opiniis grandkonvene, ke ĉiuj individuoj daŭrigu en siaj respektivaj oficoj, kaj, metinte por voĉdonado la daŭrigadon de la Estraro de H. E. A., oni unuanime aprobis ĝin kun dankesprimon pro la eksterordinara kaj trafa laborado dum la pasinta dujaro; oni decidis sendi telegramon al Lia Reĝa Moŝto, Honora Prezidanto de la Kongreso, kaj al Sr.<sup>o</sup> Cortezo, ĉiama Honora Prezidanto de Hispana Esperanto Asocio, kaj, laste, kun la plej granda entuziasmo, meze de bruega aplaŭdado, konsiderante la titanan laboron efektiviĝita de la Sroj. Martínez kaj Mojado por la realigo de la glora Kongreso de Sevilla, kiu restos ĉiamigite ĉe la jaraĵoj de la hispana esperantismo, oni donis specialan kaj laŭdplenan dank kaj miresprimon al la diritaj sinjoroj pro ilia inteligentaj kaj laŭdindaj klopodoj, finmetante la kunsidon plenary harmonie je la dudekkvara.

(Rimarko). Pro foresto de Sr.<sup>o</sup> Pastro Mojado, Prezidanto kaj

precipa organizinto de la Hispana Esperanto Instituto, oni nomis Sr.<sup>o</sup> Azorín por prezidi la kunsidon. La Sekretario Sr.<sup>o</sup> Mangada legis la raporton de l'Instituto de ĝia komenco ĝis la nuna momento; ĉiuj sekvas grandinterese la klopodojn efektivigitajn kaj la mirindajn sukcesojn atingitajn; ĉu pro la enkonduko de la ekzamenoj en la tuta nacio; ĉu pro la multenombraj Diplomoj disdonitaj tra la tuta Preskaŭinsulo; ĉu pro la klareco kaj akurateco de la kalkuloj prezentitaj kaj justece laŭdegitaj de la kontrolinta Komitato; kaj, akceptinte tutkore ĉion efektivigitan pri la Instituto, kaj gratulinte ĝian Estraron pro ĝia trafa organizado, oni aprobis la Regularon de la Instituto kune kun ĝia funkcio, la individuojn kiuj ĝin formas kaj la Estraron de ili elektitan, kaj oni akceptis kiel starigita la Hispanan Esperanto-Instituton kun danĉesprimio por ĝiaj organizintoj.

## LASTA TAGO

Vendredo, 9.<sup>a</sup> de Novembro de 1928.<sup>a</sup>

### FERMA KUNSIDO

#### AKTO KVARA

En la kunvenejo de la Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando, ĉe Sevilla, je la deko de la 9.<sup>a</sup> de Novembro de 1928.<sup>a</sup> sub la prezido de Sr.<sup>o</sup> Azorín, okazis la ferma kunsido antaŭ la proksimuma ĉeestantaro de la antaŭaj kunvenoj, kaj, post la legado de la Akto Tria, kiu estis unuanime aprobata, la Prezidanto donis la parolon al Sr.<sup>o</sup> Teofilo Cart. Nia kara prezidanto de la Akademio post malmultaj emociaj enkondukparoloj kaj per majstreco propra de sia karakteriza posteno diris: Kiŭoto, mi vin salutas; la homoj mokas vin, sed vi firme kaj persiste antaŭenmarŝas; la riĉuloj mokas Esperanton, sed vi ilin venkas; la sprituloj sarkasme ridas, sed per via noblega indulgo vi venkas iliajn ridojn kaj mokojn; kaj mi konsiladmonas vin persisti fidelaj ĉe la ekkomencita vojo, ĉar dank' al via penado, oni venkos.

Ĉi tiu estas la nobla kaj heroa Hispanujo; ĉi tiuj estas la noblaj hispanoj, Mangada, Mojado, Azorín, Martínez, la reĝino, k. t. p. ĉiuj

estas herooj; la virinoj ankaŭ estas heroinoj; Maynar kaj Máñez ankaŭ estas herooj, kaj ĉiujn samideanojn KIFOTOJ de Esperanto en la nobla Hispanujo, celantaj triumfigi la por ĉiuj duan lingvon; Esperanto estas la dua lingvo, kiu ne detruos la naciajn lingvojn: La Kongreso estis por mi surprizo, ĉiuj paroladis flue kaj propre; nia lingvo havas kelkajn pridiferencajn nuancojn, sed same okazas ĉe la aliaj lingvoj; via elparolado estas perfekta, kaj vi ĝin parolas kvazaŭ ĝi estas la hispana; mi viĝn gratulas.

La Floraj Ludoj estis simbolo de Esperanto pri ĝia grandega estonteco; ĝi estis mirinda Literatura festo plena je brilo, ĉarmo kaj intereso; pri la ekskursoj mi estas plena de mirrevo; mi neniam povis imagi tion, kion mi vidis en Aracena; ĝi estas vera imago de Esperanto; ĉio estas mirindaĵoj; mi jam estas maljuna, sed neniam forgesiĝos ĉe mia memoro la horoj pasintaj meze de vi; ili estis la plej agrablaj tagoj de mia tuta vivado; nur per la unueco ni venkos.

Kaj, ne povante plilongtempe deteni la emocion de sia animo, superŝutita de abundegaj larmoj, li malfermis la brakojn kvazaŭ brakpremanante la gekongresanojn por elmontri la amon, kiun li sentis pro la esperantista kaj nobla Hispanlando, kaj subite, kvazaŭ risorte, ĉiuj ĉeestantoj emocie, okullarmante ankaŭ ĉirkaŭpremis la karan maljunulon kaj heroan defendanton de la unueco kaj pureco de la lingvo de la Granda Zamenhof, aplaŭdante kaj superlaŭdegante per vivaj aklamoj S-ron Cart.

Tial kaj tiel la sukcesplena laborkongreso finis per la ora parolo de nia kara Prezidanto de la Esperanta Akademio, kaj por ne malplivalorigi la grandiozecon de la spektaklo kiun oni rigardadis, Sr.<sup>o</sup> Azorín dankis ĉiujn nome de la Estraro kaj fermis la kunsidon finmetante la VII.<sup>an</sup> Hispanan Kongreson de Esperanto en Sevilla, je la dudeka, kantante la gekongresanoj la esperantan himnon «La Espero», meze de longa entuziasmo.

La Prezidanto de la Kongreso,  
FRANCISCO AZORÍN.

La Sekretario de la Kongreso,  
PASTRO MARIANO MOJADO

APROBITA.

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio,  
VICENTE ALONSO.

# Esperanta Internacia Literatura Konkurso

okaze de la VII.<sup>a</sup> HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO  
en SEVILLA.

(DE LA 5.<sup>a</sup> ĜIS LA 9.<sup>a</sup> DE NOVEMBRO DE 1928)

Ĉiam kaj ĉie oni kutimis honori la sciecon, kaj tial ni ne miras kiam, per la Biblio kaj Mitologio, ni scias pri apoteozoj. Egiptoj kaj Hebreoj tion kutimis, diiginte la unuaj sian reĝon OSIRIS, kaj adorante la duaj poeton Davidon; sed la Grekoj estis kiuj plej altgrade honoris la sciecon, kiuj unue fondis Ateneon kaj organizis beletristikajn konkursojn kun premioj por la konkurantoj. La Romanoj imitis la Grekojn.

La Hispanoj, ĉu Arabaj, ĉu Kristanaj, okazigis gravajn festojn, kaj dum regado de iuj reĝoj, iliaj kortegoj estis tre famaj kunvenigante ĉe si poetojn kaj sciulojn el ĉiuj popoloj, kaj samtempe brilis samaj festoj ĉe Provenco. Je la jaro 1323-a, la tagon, kiam oni festas ĉiujn Sanktulojn, en ĝardeno de la franca urbo Toulouse, kunvenis sep kavaliroj amantaj la beletristikon kaj decidis sin turni al poetoj invitante ĉi tiujn partopreni konkurson por la UNUA DE MAJO de la sekvanta jaro, promesante violon el oro al plej bona poeto; kaj la urbestro voĉdonis okazigi ĉiujare KONKURSON, kaj pligravigis la aferon nomante kancelieron kaj sekretarion: la UNUA stampis la premiitajn versaĵojn, kaj la DUA kopiis ilin sur aparta registrolibro, kaj 32 jarojn de post la unua konkurso, oni starigis ĝiajn leĝojn kaj duan kaj trian premiojn, kiuj estis krataga floro el oro kaj DOKTORO la gajninton la tri premiojn.

Ankaŭ oni kronis el laŭro la plej bonan kaj alnomis lin FIDELA AMANTO DE L'KORTEGO DE AMO, ĉar li ricevis la kronon kaj premiojn el manoj de virino nomata REĜINO, kaj ĉirkaŭata de aliaj virinoj, ĉiuj junaj kaj kiel eble plej belaj, formantaj la KORTEGON DE AMO. La festo komenciĝis per diservo kun ĉeesto de la urbokonsilantaro; la poetoj en la urbestrejo deklamis siajn versaĵojn dum solena kunveno antaŭ la aŭtoritatuloj, k. c., la duan tagon; trian tagon, la poetoj, izolataj ĉe salono, improvizis verkojn pri antaŭe difinita temo, kaj poste antaŭ statuo de KLEMENCIO el blanka marmoro kronata de floroj kun zono el floroj pendanta ĝis la piedoj, la poetoj deklamis

la improvizitaĵojn kaj ricevis premiojn, kaj fine la publiko kaj muzikistaroj, urbaj estroj kaj gardistaro, solene akompanis premiitoj al iliaj hejmoj.

En ĉiuj regionoj de Hispanujo, de antaŭlonge, oni kutimas okazigi tiujn FLORAJN LUDOJN aŭ LITERATURAJN KONKURSOJN, kaj la «Hispana Esperanto-Asocio», per ĉi tiu cirkulero sciigas la fondon de la INTERNACIA LITERATURA KONKURSO DE ESPERANTO al niaj samideanoj de la tuta mondo.

La UNUA KONKURSO estis okaze de la VII-a. Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilla, de la 5-a ĝis la 9-a de Novembro de 1928-a, laŭ la jenaj temoj:

I.-a.—Kanto al la Majstro, Dr.<sup>o</sup> Zamenhof. Per ĝi oni vidigos lian gloran, laboreman, homaman vivon (Tiu temo konsistos el ne malpli ol 150 versoj, kaj ne pli ol 300). = II.-a.—Kanto al la internacia helpa lingvo Esperanto. = III.-a.—Kanto al la interna ideo de Esperanto. (En la II-a kaj III-a temoj, la verkoj enhavos minimume 50 versojn, kaj maksimume 100). La rimo de ĉi tiuj tri kantoj estos tute perfekta kaj kompleta. IV.-a.—V.-a.—kaj VI.-a: Ĉi tiuj tri temoj estos prozaĵoj laŭ kiel eble plej simpla Zamenhofa stilo, pri la samaj tri antaŭaj temoj, sed la «Kanto al la Majstro» (IV-a temo) estos nur proza poemo, glorante la Majstron, ne priskribante, kiel la verso postulas. Ĉi tiuj tri temoj konsistos maksimume el 150 linioj, kaj minimume el 76 linioj (ĉiu linio el 70 literoj). = VII.-a.—Projekto pri kiel eble plej simpla organizado de la Tutmonda Esperantistaro sur la bazo de Universala Esperanto-Asocio, unuigante reale la Esperantistojn, simpligante la kotizaron, enkalkulante en ĝin la naciajn Asociojn kvazaŭ aŭtonomajn elementojn de tutmonda ŝtato, kaj ĉiajn profesiajn Asociojn kiel teknikajn fakojn. La projekto ne kalkulos pli ol 250 linioj (70-litera ĉiu linio), kaj pritraktos la Regularon kaj ĉion necesan por starigi unuigitan Esperantistaron. = VIII.-a.—Kanto al Sevilla (esperante: Sevilo). Premio de la Urbokonsilantaro de Sevilla. = IX.-a.—Kanto al Hispanujo. — Premio de la Provinca Deputataro de Sevilla. = X.-a.—Kanto al Esperantujo. Ĉi tiuj tri lastaj temoj, kalkulos minimume 150 versojn kaj maksimume 200.

La verkoj ricevitaj restos absolute proprajo de Hispana Esperanto Asocio, kaj la templimo por akcepti originalojn estis la tagon 25 de Aŭgusto de 1928.

*La Sekretario-Kasisto de la Organizanta Komitato.*



JUGANTARO  
DE LA LITERATURA KONKURSO

Sr.<sup>o</sup> Teofilo CART, Prezidanto de la Akademio de Esperanto,  
París (Francujo).

Sr.<sup>o</sup> John Mabon WARDEN, Vicprezidanto de la sama Akademio,  
Edinburgh (Britujo).

Sr.<sup>o</sup> Leon BELMONT, Lingvo Komitatano, Warszawa (Polujo).

---

VERDIKTO  
DE LA  
INTERNACIA LITERATURA KONKURSO  
DUM LA VII.<sup>a</sup> HISPANA ESPERANTO-  
KONGRESO EN SEVILJO

---

FLORAJ LUDOJ

La Organiza Komitato de la Konkurso, konsciante la verdikton de la Juĝistoj Sr.<sup>o</sup> Cart, Warden kaj Belmont, decidis doni la jenajn premiojn:

Temo 1. **Kanto al la Majstro Dr.<sup>o</sup> Zamenhof** (poezio).

1-a premio da 150 pesetoj al s-ino Catharina Vermeer, de Zutphen (Nederlando).

2-a premio da 50 pesetoj al f-ino Hilda Dresen, de Tallinn (Estonujo).

Temo 2. **Kanto al la internacia helpa lingvo Esperanto** (poezio).

1-a premio da 100 pesetoj al Sr.<sup>o</sup> Johannes. E. Moenck, de Berlín (Germanujo).

Temo 3. **Kanto al la interna ideo de Esperanto** (poezio).

1-a premio da 100 pesetoj al f-ino Varma Jarvenpää, de Vammaia, Ilo (Fianlando).

Temo 4. **Kanto al la Majstro Dr.<sup>o</sup> Zamenhof** (prozo).

1-a premio da 100 pesetoj al Sr.<sup>o</sup> José Anglada Prior, de Barcelona (Hispanujo).

Temo 5. **Kanto al la internacia helpa lingvo Esperanto** (prozo).

Neniu premio.

Temo 6. **Kanto al la interna ideo de Esperanto** (prozo).

1-a premio da 100 pesetoj al Sr.<sup>o</sup> J. Širjaev, de Baklanka (Rusujo).

2-a premio (honora mencio) al Sr.<sup>o</sup> Vincent William, de London (Anglujo).

Temo 7. **Projekto pri plej bona Esperanta organizo** (prozo).

1-a premio da 100 pesetoj al Sr.<sup>o</sup> José Anglada Prior, de Barcelona (Hispanujo).

2-a premio (honora mencio) al Sr.<sup>o</sup> Aleksander Siitam, de Tallinn (Estonujo).

(Rimarko. La 7 unuaj premioj estas donitaj de Hispana Esperanto-Asocio).

Temo 8. **Kanto al Sevilla** (poezio).

1-a premio da 250 pesetoj al Sr.<sup>o</sup> Teo Jung, de Köln (Germanujo), donita de la Moŝta Urbeŝtraro de Sevilla.

2-a premio: artobjekto al Sr.<sup>o</sup> Julio Mangada Rosenörn, de Madrid (Hispanujo), donita de l'Ateneo de Sevilla.

Temo 9. **Kanto al Hispanujo** (poezio).

1-a premio da 250 pesetoj al Sr.<sup>o</sup> Julio Mangada Rosenörn de Madrid (Hispanujo), donita de la Moŝta Provinca Deputataro de Sevilla.

2-a premio da 100 pesetoj al Sr.<sup>o</sup> Joseph Berger, el Waldshut (Germanujo), donita de la Hispana Esperanto-Asocio.

Temo 10. **Kanto al Esperantujo** (poezio).

Ne konkursita.

La premiitaj aŭtoroj ankaŭ ricevis tre belajn kaj artajn diplomojn de tiu Esperanta Literatura Konkurso.

Sevilla, la 7.<sup>an</sup> Novembro 1928.<sup>a</sup>

La Sekretario-Kasisto de la Organiza Komitato,  
CARLOŠ MARTÍNEZ FERNÁNDEZ.



Reĝino por la Floraj Ludoj en Seviljo: Bela samideanino fraŭlino  
Enriqueta Escacena.



### Esperantaj Floraj Ludoj, en la Teatro Lloréns

De maldekstre-dekstre. UNUA VICO.— Korteganinoj: F-inoj Rosario Rodríguez, María Garzón, Aurora Ortega, María Rodríguez; paĝio: infanino Carmelita Rodríguez; Reĝino: F-ino, Enriqueta Escacena; paĝio: infanino Asunción Fuentes; korteganinoj: F-inoj, Dolores del Pozo, Carmen Rodríguez, Rosario del Pozo kaj María J. Escacena. DUA VICO.— Paroladisto: Pastro Mariano Mojado; Premiito dufoje: Sr. José Anglada Prior; flagoj de esp. grupoj de Chestre, Sevilla, Tocina, Madrid, Zatorzá, Córdoba, Badajoz kaj Oviedo; Premiito kiu atingis la premion de la Provinca Deputitaro kaj tiun de l'Ateneo de Sevilla: Sr. Julio Mangada Rosenorn; sekretario: Sr. Carlos Martínez Fernández.

## ESPERANTAJ FLORAJ LUDOJ

---

Por solenigi la Esperantan Internacian Literaturan Konkurson okazis en Sevilla la Festo de la Floraj Ludoj, la tagon 7.<sup>a</sup> de Novembro de 1928, je la dekunua matene.

Tiu Literatura Festo estis la Zenitpunkto de l'Kongreso. Plenbrila la belega Teatro Lloréns, sub ĉeesto de la urbaj aŭtoritatuloj kaj kun sufiĉe nombra ĉeestantaro, el kiu multaj virinoj sin ornamas per la mirindaj bril koloraj broditaj silkoŝaloj, komencis tiun allogan spektaklon.

La urba muzikistaro ludas triumfan marŝon kaj eniras en la salonegon la riĉaj kaj esperantaj flagoj de diversaj Grupoj de Hispanujo kiel avangardo de la Kortego de Amo, meze de tondra aplaŭdado, kaj, post la flagaro, la belaj korteganinoj, ĉarmaj junulinoj: Rosario Rodríguez, María Garzón Rufo, Aurora Ortega, María Rodríguez, Dolores del Pozo, Carmen Rodríguez, Rosario del Pozo kaj María J. Escacena, ĉiuj kun silkaj luksaj blankaj roboj, prezentante sur la virgulinaj brustoj, fiksitajn verdajn opajn literojn de l'vorto ESPERANTO.

Sekvas la belega reĝino en radia beleco, f-in.<sup>o</sup> Enriqueta Escacena Bermejo, riĉe bele blankvestita, prezentante sur la bruston grandan verdan R, sin apogante ĉe la brako de la Urbestro de Sevilla, sekvate de du ĉarmaj knabinoj Carmelita Rodríguez kaj Asunción Fuentes, subtenantaj la ekstremon de la longa reĝina jupo.

Ni forgesis diri ke la Korteganinoj eniris en la salonon sin apogante ĉe la brakoj de la provinca deputato Sr.<sup>o</sup> Manuel Beca, de la urbeŝtrano Sr.<sup>o</sup> Alfonso Trías, de la prezidanto de nia Akademio Sr.<sup>o</sup> Teofilo Cart, de la prezidanto de la Kongreso Sr.<sup>o</sup> Francisco Azorín, de la Artileria subkolonelo Sr.<sup>o</sup> Enrique de Uriarte, de la prezidanto de la Ligo de Hispanaj Esp. Fervojistoj Sr.<sup>o</sup> Luis R. Escartín, de Dr.<sup>o</sup> Carlos de San Antonio kaj de Sr.<sup>o</sup> Luis Campos.

Solenega, belbrila, triumfa estas la pasado de la Kortego tra la Teatro en la scenejon al pompa trono kaj sidlokoj. En la fono forte staras verdaj la standardoj, elĵetas fulmojn iliaj pintoj sub la abundaj

lumfaskoj de la lampoj. Emocio tremas. Kortuŝo regas kaj fiereco esti esperantisto.

La Kortego sidas kaj sur la korteganinajn brustojn, apud la flamaj koroj de la belulinoj, rigardo ĉies legas ESPERANTO. Feina voĉo per alloga lingvo de Zamenhof eliras el dianta buŝo de la reĝino por rajtigi la subtenanton Sr.<sup>o</sup> Mariano Mojado paroli pri la festo:

Ĉi tiu samideano faras mallongan paroladon laŭdante la celon de la festo, la belecon de la virinoj kaj la altan idealon de nia helpa internacia lingvo Esperanto, finante per huraoj al la hispana Reĝo, al la Urbestro de Sevilla, kiu nelacigeble kunlaboradis por plibone sukcesigi la kongreson, kaj al nia kara majstro Dr.<sup>o</sup> Zamenhof, elpensinto de la lingvo.

Denove la ravanta voĉo de la reĝino audiĝas, kvazaŭ amfreneziganta melodio, invitante la sekretarion legi la verdikton kaj nomojn de la premiitoj kaj petante ĉi tiujn aliri al la trono por ricevi de siaj manoj diplomojn kaj premiojn.


La Sekretario legas le verdikton, kaj la ĉeestantaj premiitoj Sr.<sup>o</sup> José Anglada Prior kaj Julio Mangada Rosenörn, riverencante ricevas la diplomojn kaj premiojn, kaj la reĝino petas Sr.<sup>o</sup> Mangada legi strofojn de la Kantoj al Hispanujo kaj al Sevilla kaj traduki ilin al hispana lingvo por ke la neesperantistoj ĉeestantaj konu la kantojn.

Sr.<sup>o</sup> Mangada legas emocie sian «Kanto al Hispanujo» kaj poste tiun de Sr.<sup>o</sup> Teo Jung «Kanto al Sevilla», eksplodante ĝeneralan aplaŭdadon.

Sekve, post tiu legado, okazis alia solenaĵo: la Reĝino ligis, unu post la alia, la verdajn belbroditajn memorrubandojn al la verdaj flagoj de la esperantaj Grupoj, kiuj sendis ilin al la Kongreso. Anĝelaj manoj de samideaninoj de Sevilla delikate kaj arte preparis la rubandojn kaj la diinaj manoj de la Reĝino alifiksis la bantojn. Beleco ilin ornamas, konvinkon ilin portos kun kuraĝo al la venko fina kaj glora, farante nedetruibla la unuiĝon de la hispanaj geesperantistoj.

Dum la ligo de tiuj rubandoj al la standardoj de la esperantaj Grupoj, de Cheste, Sevilla, Tocina, Madrid, Zaragoza, Córdoba, Badajoz kaj Oviedo la urba muzikistaro ludadas la himnon «La Espero».

Post fotografaĵoj, la rulkurteno falas kaj finiĝas tiun solenan, plenbrilan kaj emociigan feston, ludante la muzikistaro la nacian hispanan himnon.



La Florreĝino kun sia kortego kaj esperanta flagaro



Bela kaj arta diplomo donita al la aŭtoroj monpremiitaj en la Literatura Konkurso

(Rimarko: Pro mankspaco por publikigi ĉiujn premiitajn verkojn,  
:- oni decidis presigi sur tiu-ĉi Libro nur la du sekvantajn.) :-)

# KANTO AL SEVILJO

DEVIZO: NO M'HA DEJADO

AUTORO: Sr.° Teo JUNG, el Köln (Germanujo)

**(Atingis la premion de la Urbeŝtaro de SEVILLA)**

Aŭskultu—

Atingas min sorĉaj akordoj:

Kunŝvingas sonoriloj en bela harmonio.

Alten graciigas «Ĥiraldo» la mirakla,

Kunŝonas ĝiaj voĉoj je rava melodio.

«Seviljo», ho «Seviljo», vi krono briljuvela,

Pri vi mi nur ekpensas—jam venkas min sopiro.

Pendas antaŭ mia fenestro pezaj nuboj—

Al via ora suno min logas la deziro.

Al «Sudo»,

Al Suno min tiras sopiro,

Al paradizaj parkoj, je bonodoroj plenaj:

Ĉarme alridetas ĝardenoj «Alkasaraĵ»,

Ĉielen palmoj celas majestaj kaj serenaj.

Ho «Alkasaro», verko de majstro senkompara,

Ho parkoj, ho florujoj, sveniga bonodoro!

Vintro nun ekregis ĉe ni, mi frostotremas—

Mi volus rozbukedojn, kaj varmon por la koro.

Mi volus

Revidi la landon de l'Suno,

Mi volus flugatingi la «Urbon de la Ĝojo»:

Ridas floroj, homoj el ĉiu eta korto,

Ĉe placoj kaj ĉe stratoj, ĉe plej kaŝita vojo.

Kaj super ĉio brilas—unika ĝojkupolo,

Sen eta eĉ nubeto—la firmamenta bluo.

Griza ĝi minacas ĉe ni, inkubopreme—

Peceto nur de l'«via» jam estus dia ĝuo!



Ho «songoj»,  
Forportu min al la beata,  
La multmirakla urbo sur la pli suda tero!  
Pompe reaperu la parkoj kaj ĝardenoj,  
La domoj kaj palacoj, «Gvadalkivir»-rivero!  
Per ŝip' ni alveturas. Ni faris bonvojaĝon:  
La vastan oceanon, danĝerojn ni travelis;  
Spitis ni ondegojn, kaj rifojn, uraganojn,  
Jen ni atingis kion sopire ni alcelis!

Aŭskultu—

Salutas nin sorĉaj akordoj:  
Kunsonas sonoriloj je rava melodio.  
Alta la «Ĥiraldo» alsendas siajn voĉojn  
Akcepti nin aklame en bela harmonio.  
«Seviljo», ho «Seviljo», vi nun matene virga,  
Al via ora suno min logis la deziro.  
Pasis grizaj tagoj kaj vintraj frostotremoj—  
Jen mi al vi revenis, venkite de l'sopiro.

Ni haltis.

La teron aliras mi pic:  
Antikvan historion jen ĉie mi renkontas.  
Strangaj sentimentoj vekigas en la brusto,  
Dum praaj rememoroj ĉe ĉiu paŝ' elfontas.  
Potenco kaj fiero—malforto, humileco;  
Malsat', mizer' senlima—kaj ĝuo, riĉ' abunda;  
Sanga batalado—kaj paco ride ĉarma;  
Feliĉo ĉielalta—kaj malfeliĉ' senfunda.

«Iberoj»

Pratempe vivadis ĉi tie.  
Enmarŝis la legioj kun akre skanda takto:  
«Rom'» starigis aglojn sur Hispalis'aj muroj;  
Forlavis «ĝin» la granda «Migrada» katarakto.  
«Vandaloj, gotoj, maŭroj» hejmadis sinsekvante;  
La glora «Almansoro» ĉi tie ekrezidis:  
Grandan kaj potencon li faris «Ĥbilija'n»,  
Ke tian reĝan brilon la urbo ne jam vidis.

Sed plue

Turniĝas la rado de l'tempo:  
Sur la pasema Tero nenio estas daŭra.

«Kruco» alten ŝvebas, «Krescento» devas cedi;  
«Kristanaj Reĝoj» regas, finita—regno maŭra...

Refoje tempo glora: revenis multimulo;

«Gvadalkiviron» plugas fieraj karaveloj—

«Novan Mondon» trovis la kuraĝul' «Kolumbo»,

Kaj nun kun freŝaj fortoj al novaj grandaj celoj!

Abunde

Alfluas riĉaĵo kaj famo,

El malproksimaj landoj ŝutiĝas la trezoroj:

«Oro» pluve falas, je montoj amasiĝas.

Ĉu vero? Ĉu fabelo, pasemaj songofloroj?...  
Sed nun mi jam forlasu la tempon senrevenan:

En alta la ĉielo jen kia brubruado?

«Birdo artfarita» ĵus pasas la «Hiraldon»—

Delonge pluturniĝis rapida tempo-rado.

Delonge

Forfluis la tempoj antikvaj;

Formortis la aktoroj, sed la scenejo restis:

Restis bril' kaj famo, la milmil mirindaĵoj,

Per kiuj diaj majstroj vin pompe iam vestis.

«Seviljo», ho «Seviljo», mi kore vin salutas!

Spiro mia granda ĉe vi nun trovis finon.

Ĝoje mi eniras stratetojn viajn ĉarmajn,

Je ĉiu paŝ' admiras vin brilan la Reĝinon.

Mi paŝas...

Okuloj ne lacas admiri

Artemon kaj laboron de gloraj lu jarcentoj:

Granda kaj belega leviĝas «Katedralo»—

Interne tuj vin kaptas mistikaj sentimentoj.

Denove kelkaj paŝoj—jen pompas «Alkasaro»

Kun la fabelsalonoj, unika la fasado;

Mil kaj Unu Noktoj image ekverigiĝas,

Ekflirtas la spirito de l'fama Ŝerazado.

Preĝejoj,  
Palacoj, muzeoj sennombre!  
Gavidist' ne estas kiu tra ĉio vin fingvidus.  
Vane vi klopodus ĝin laŭ valor' atenti—  
Vi povus vivon resti, kaj ne duonon vidus.  
Ĝin dece surkonstrui kaj ĝin ornami digne,  
El artgeniaj kapoj elsaltis diaj planoj—  
Ilin realigi, al ili formon doni,  
h'readis mil talentaj, mil diligentaj manoj.

«Seviljo»,  
Benita vi, multenviinda,  
Vi ĝojoradiana, feliĉa vi «Patrino»—  
Prave vian kapon vi portas kun fiero,  
Ĉar grandajn filojn naskis fertila via sino.  
Du nomojn mi nur citu el la tro granda aro:  
Du majstrojn de l'peniko—«Velázquez» kaj «Murillo»;  
Stelojn ĝisatingas, sen lim' sen fino estas  
La fam' eterne gl'ora de «l'filoj de Seviljo».

Mi paŝas  
Kaj paŝas; altiras rigardon  
Palacoj el marmoro kaj simplaj la kabanjoj.  
Flame en sunbrilo la asulehoj fulmas,  
El la intimaj kortoj plaŭdsonas la fontanoj.  
Min ĉarmas ombroplenaj arbustoj en la parkoj,  
De la ĝardenoj riĉa, belega florumaro.  
Palmojn mi admiras graciajn, altencelaj,  
Oranĝojn orbrilantajn el verda foliaro.

Kaj homojn  
Dotitajn de suda la suno:  
Koloro—de kaŝtano, okuloj—karba ardo;  
Kor'—serena gajo, la sang'—vulkano bola;  
Pasio—eksplozema simile al petardo.  
La viroj—kavaliroj, al noblaj faroj emaj;  
Virinoj—belulinoj, ĉu «Karmen» ĉu madonoj;—  
Kiel sur scenejo, en dramoj kaj operoj  
La majstroj ilin pentris per vortoj kaj per tonoj.

### Aperas

Figuroj el Mozart, Rossini,  
Bizet kaj Molière; aperas, vivas, agas:  
Ruza prezentigas «Figaro la Barbiro»,  
Pli lertan intrigulon apenaŭ vi imagas.  
Jen «Don Huan'», la fama ĉesisto de virinoj,  
Li—preta ja por ĉia galanta aventuro.  
Tro memfida ĉiam, ĝis puno lin atingas  
Per lia ŝtona gasto—timiga la «Komturo».

### Kaj «Karmen»

Ekdancas en ritmo sovaĝa;  
«Ĥoseon» ekflamigas la fajra «Segvidiljo».  
Sed en lia mano jam vidas mi ponardon—  
Ĉar ŝian amon ŝtelis l'espado «Eskamiljo».  
Triumfe «Eskamiljo» jen de l'batalo venas,  
La venko jus lin faris plej fama matadoro.  
Bruas la areno, tumultas, ĉapojn jetas—  
Dum l'amatino falas, trafite tra la koro.

### Eruptas

L'areno multmilan amason:  
Finita—nervotiklo, la taŭrbatal'—ĉesinta.  
Straten la spektintoj verŝigas diskutante,  
Perdiĝas en vastecon de l'urbo labirinta.  
Fraŭlinojn elegantajn, sekvatajn de l'patrino  
—Kun ventumil' en mano, kun «pejno» kaj mantiljo—  
Preteriras fraŭloj, «piropon» transvokante,  
Kaj sprite tuj respondas filinoj de «Seviljo».

### Krepuskas;

Vespero kliniĝis malsupren.  
«Seviljo» sin ekbanas en fluo vesperora.  
Alta la «Ĥiraldo» refoje sin aŭdigas:  
Al Angeluso vokas nun ĝia voĉ' sonora.  
Jen marŝas Don Fernando al hejm' de l'amatino,  
Ĉe ŝia «reho» stari, sekrete amkonfesi,  
Flustri sanktajn jurojn pri fidelec' eterna,  
Kaj kisi kaj karesi, ripeti kaj ne ĉesi.

Pleniĝas

Teatroj kaj festosalonoj,

Ekregas bonhumoro, eksonas gajaj kantoj,

Fajre tra la vejnoj flutiklas la «Rioho»:

Balzamo por soifo kaj koro de l'festantoj.

Surprizo prepariĝas: jen per freza takto

Ekklakas kastanjetoj, ekvipas la muziko;

Belulinoj turnas en danc' graciajn korpojn—

Entuziasmigite aplaŭdas la publiko.

Noktiĝis;

«Seviljo» nun kuŝas en dormo.

El parkoj kaj ĝardenoj levigis la parfumoj,

Narkotige dolĉe aeron saturante,

Kaj supre ekvekiĝis arme' de milmil lumoj.

Fajreras iii, fulmas kun brilo nevidita,

Kun pompo neaŭdita—ĉielaj diamantoj;

Gardas kaj rigardas la strangan teromondon,

Miradas pri la homoj, en dolĉa dorm' songantaj.

Eksongas

Mi mem, kaj la sonĝo en sonĝo

Eĉ multe pli beligas, pli fabeligas ĉion:

Mankas vortoj. Plumo priskribi ne kapblas

Tiome grandiozan, neteran jam vizion.

«Seviljo», ho «Seviljo», vi mem ja estas Songo,

Fatamorgan' sublimes, trovita land' Ofiro;

Vi—la vivo estas, la ĝojo kaj feliĉo;

Vi—de l'sopir' finiĝo, plenumo de l'deziro!

Kaj jen do

Ekvidu, Reĝino sublimes,

Humilan la poeton ĉe via alta trono:

Kanti mi alvenis sinceran laŭdokanton.

Ke ne al vi malplaĉu modesta mia dono!

«Seviljo», ho «Seviljo», vi perl' Andaluzia,

Ornam' de Hispanlando, de l'tuta mond' juvelo!

Pli kaj pli vastiĝu eterna gloro via,

Ĝi brilu ĉiam freŝe en plej radia helo!

— — —  
«Vivu Seviljo!»

## Klarigoj pri la antaŭa poezio

(Strofo: Str.)

- Str. 1.** Ĥiraldo = hispane: Giralda (pr. ĥira'lda, la fama sonorila turo de la Katedralo de Seviljo.  
Seviljo = hispane: Sevilla (pr. sevi'lja), la ĉefurbo de Andaluzio.
- Str. 2.** Alkasaro = hispane: Alcázar (pr. alka'sar), fama palaco en araba stilo.  
Precipe famaj estas ĝiaj ĝardenoj.
- Str. 3.** Korto.—Tre karakterizaj ĝuste por Seviljo estas la kortoj de ĝiaj domoj (korto = hispane: patio, pr. pa'tjo), kutime riĉe ornamitaj per floroj, palmoj, statuoj kaj fontanoj. Ili estas la kutima restadejo de la familioj dum la varmega sezono.
- Str. 4.** Guadalquiviro = hispane: Guadalquivir (pr. gvada'lkivir), unu el la ĉefaj riveroj de Hispanlando. Sur ĝi povas Seviljon aliri la grandaj marŝipoj, per kio Seviljo estas eĉ marhaveno, kvankam ĝi situas sufiĉe malproksime de la maro.
- Str. 7.** La pralogaĵoj de la Pirenea duoninsulo estis keltiberoj. Poste konkeris la landon la romanoj. Ilin forpelis (dum la granda Migrado de la Popoloj) germanaj gentoj: vandaloj (laŭ kiuj la lando de Seviljo ricevis la nomon «Andaluzio» = Vandaluzio), poste okcidentaj gotoj, kaj fine la araboj (maŭroj), kies plej fama regnestro estis Almansoro (arabe: Al-Manŝur), «La Venkoriĉa», kiu havis sian ĉefan rezidejon en Marakeŝ.  
Hispalis = la antikva nomo de Seviljo.  
Iĥbilija = la araba nomo de Seviljo.
- Str. 8.** Kruco kaj Krescento: la insignoj de kristanismo kaj mahometanismo (krescento = duonluno kreskanta = unua kvarono).  
Kristanaj Reĝoj, pli ĝuste «Katolikaj Reĝoj» (hispane: Reyes Católicos): la kristanaj reĝoj en Hispanlando. Preskaŭ ĉiu urbo posedas iun straton aŭ placon nomitan laŭ la «Reyes Católicos».  
Karaveloj: mezepokaj ŝipoj.  
Kristoforo Kolumbo: la eltrovinto (pli ĝuste: retrovinto) de Ameriko (la «Nova Mondo»).
- Str. 9.** Konata estas la orriĉaĵo, kiu inundis Hispanlandon post la konkero de la regnoj Azteka kaj Inka. Ĝi sekvigis per si mem ekfloron de ĉiuj artoj.
- Str. 11.** La fasado de l'Alkasaro apartenas al la plej belaj, plej harmoniaj konstruaĵoj de la tuta mondo kaj de ĉiuj tempoj.  
Mil kaj Unu Noktoj: la konata orienta fabelkolekto.

Ŝerazado: konata kiel rakontistino de tiuj fabeloj. Ŝia talento elpensi kaj rakonti ĉiam novajn fabelojn laŭlegende savis ŝin de kruela morto.

**Str. 13.** Velázquez (pr. vela'skes) kaj Murillo (pr. muri'ljo): apud Zurbarán kaj Goya (pr. go'ja) la plej famaj hispanaj pentristoj. Ambaŭ naskiĝis en Seviljo.

**Str. 14.** Asuleĥoj = hispane: azuleĥos (pr. asule'ĥos), fajencaj platoj (mozaiko), multe uzataj en Hispanlando por la ornamo de ĉiuspecaj konstruaĵoj: preĝejoj, domoj, ŝtonaj benkoj, fontanoj ktp.

**Str. 16.** Mozart (pr. mo'cart) verkis du operojn, kies scenejo troviĝas en Seviljo: «Don Ĥuan'» (aŭ: «La ŝtona gasto») kaj «La edziĝo de Figaro»; plej konata estas la opero de Rossini (pr. rosi'ni): «La barbiro de Seviljo». Bizet (pr. bize') verkis la nemorteman operon «Carmen» (pr. ka'rmen), kaj Molière (pr. molje'r) verkis dramon pri la sama «ŝtona gasto», pri kiu Mozart verkis sian operon.

Komturo: li estas la ŝtona gasto. Kiam Don Ĥuan' fanfaronas ĉe la monumento de la komturo, kiun li mortigis en duelo, pri siaj novaj amaventuroj kaj la monumento subite ekparolas, avertante lin, tiam Don Ĥuan' arogante invitas lin esti lia gasto ĉe festeno. Dum la festeno efektive aperas la monumento, kaj Don Ĥuan' pro teruro falas teren mortigite.

**Str. 17.** Karmen (Carmen), Ĥoseo (José, pr. ĥose') kaj Eskamiljo (Escamillo, pr. eskami'ljo) estas figuroj el la opero «Carmen», de Bizet. Ĥoseo estas la amato de la ciganino Karmen; sed ŝi forlasas lin pro Eskamiljo. Pro jaluzo Ĥoseo mortigas la amatinon, kiam Eskamiljo ĵus festas sian triumfon en la taŭroludejo.

Segvidiljo = hispane: Seguidilla (pr. segvidi'lja, konata hispana danco. Espado kaj matadoro: aliaj esprimoj por torero, toreadoro. Espado estas tiu toreadoro, kiu devas mortigi la taŭron.

**Str. 18.** Pejno = hispane: peina (pr. pe'jna), alta kombilo.

Mantiljo = hispane: mantilla (pr. manti'lja), manteltuko metata super la pejnon.

Piropo: sprita alvoko de la junuloj al junulinoj, kiun la junulinoj de Seviljo kutimas respondi ne malpli sprite.

**Str. 19.** Anĝeluso = latine: angelus Dei, «La anĝelo de Dio...», la vesperpreĝo.

Reĥo = hispane: reja (pr. re'ĥa), t. e. krado. En Seviljo kaj multaj aliaj hispanaj urboj la fenestroj de la teretaĝo, kelkfoje eĉ tiuj de la supraj etaĝoj, havas kradon. La junuloj venas vespere antaŭ la kradon de l'amatino por amindumi.

**Str. 20** Rioĥo = hispane: Rioja (pr. rio'ĥa), fama vino.

Kastanjetoj: du lignetoj, per kiuj oni faras klakan bruon, kiu akompanas la dancon.

**Str. 22.** Ofiro: la lando, al kiu la reĝo Salomono sendis ŝipojn por alporti oron (Ophir).

# KANTO AL HISPANUJO

---

DEVIZO: PATRUJAMO ne naskas malamon  
al ceteraj popoloj; sed tute male.

AUTORO: Sr.<sup>o</sup> Julio Mangada Rosenörn el  
Madrid (Hispanujo).

(Atingis la premion de la Provinca Deputataro de SEVILLA)

## ENKONDUKO

Mi jam volus esti granda la giganto  
de la poezi'...; ĉar Muzoj  
min neniam helpis, estos mia kanto  
nur de l'fantazio... ruzoj.  
Tamen kvankam oni juĝu min ne saĝa  
pro pretendo kanti CIN,  
mi min sentas tute plene ja kuraga,  
ne timigas min la fin',  
Mi penadus estu por la kantesprimo  
la inspiro tute rekta,  
same tre belsona kaj kompleta rimo,  
kiel eble plej perfekta.  
La sufiksojn, participojn, mi ne uzos,  
for la rimoj tre facilaj;  
ilin mi malŝatas, ilin mi rifuzos,  
kvankam estas tre utilaj;  
min allogas la gracilaj  
versoformoj. Mi kuragas; mi, do, MUZOS,  
kvankam tio ĉi ja kaŭzos,  
ke juĝistoj min tre taŭzos!

\* \* \*



## ĜIA NATURO

Kaj oras la suno, kun fajraj la heloj;  
arĝentas la luno, brilegas la steloj  
ĉe pura lazuro... Fariĝas kontento  
ja ĉio, plezuro, al kora la sento  
en kiu ajn loko: ĉe monto, ĉe valo,  
ĉe stepo, ĉe roko. (Spirita regalo!

De l'maroj la ondoj sinsekve ĉu rulas?  
Vidiĝas ne rondoj, supraĵon ne lulas.  
Sed jen, furiozaj jam ili tre bruas,  
kaj tre grandiozaj ja ĉion fort skuas.  
De l'maro ĉe l'bordoj de l'Nordokcidento,  
tre vastaj la fjordoj ekzistas, sed sento  
pli ĝojas ĉi tie se ilin ĝi vidas,  
ĉar ŝajnas, ke, die, Naturo plenridas,  
montrante sin bela, m'irinda, fruktdona,  
varia, ĉiela, ne rokmonotona:  
sur montaj deklivoj de tiuj edenoj,  
jen arb' de l'olivoj kaj la rosmarenoj,  
la kverkoj, abioj, la pinoj, la fagoj,  
la ulmoj, tilioj kaj poploj, kratagoj...  
En iuj la lokoj, de l'akvo la faloj,  
de supren altrokoj, alsaltas al valoj.  
Kaj, suben, trankvilas la fjordoj tre vastaj  
kaj plumbe jam brilas je l'heloj taglastaj.

Kaj arbojn aliajn tra ĉie vi trovas,  
arbustojn variajn, mi citi ja povas.

Kaj jen de la floroj la riĉaj ornamoj,  
iliaj koloroj, iliaj balzamoj...  
Jen rozoj, lilioj, siringoj, diantoj,  
levkajoj, dalioj, violoj, lekantoj...

En stepaj mesetoj, montaroj kaj valoj,  
troviĝas ĉu betoj, ĉu la cerealoj,  
orango, citrono, la figo, ĉerizo,  
vinberoj, melono, persiko, merizo,  
daktilo, banano, la piro, granato,  
kaj la sukerkano, la pruno, tomato,  
la gros', abrikoto, la frago, la pomoj,  
la frambo, karoto..., kaj multaj legomoj...  
kaj fruktoj aliaj de l'riĉa la grundo  
eĉ multe variaj laŭ plena l'abundo.  
Por iuj destinoj, oleoj; mielo,  
valoraj la vinoj... Ho, mia ĉielo!

Tre riĉa da brutoj; da fiŝoj, sen fino:  
la salmo, la trutoj, merlango, sardino...;  
da birdoj: pasero, kolombo, koturno,  
la koko, ansero, perdriko..., la sturno...

Minejoj: metaloj: arĝento, la kupro,  
la fero...; la saloj...; la karboj... ĉe l'supro  
de l'tera la krusto, aŭ, kvazaŭ terkerno,  
laŭ la Naturgusto, en ĝia l'interno.

Marmoroj, granitoj... Ĉe grotoj, salonoj  
kun la stalagmitoj tre vitraj, kolonoj,  
kaj kvazaŭ statuoj, kurtenoj kaj plantoj.  
Ha, kiaj la ĝuoj al Naturamantoj!

CIA riĉo, HISPANUJ'!, kulminaciis;  
tial CIAN riĉon tute bone sciis  
multaj Gentoj

kaj ĝin jam sinsekve ili ambiciis:  
post la tentoj,  
jam sin jetis al konkiro  
kun avida la deziro.

#### LA INDIĜENO

Nobla, sindonema, lerta l'indigeno:  
tre inteligenta; aventuron,  
kavalire, memofere, sen deteno,  
entreprenas; sentas li plezuron  
sin montradi ĉiam preta, kaj tre bravas  
kontraŭ malĝustajojn; grandanima  
ĝis la heroeco, ĉiajn fortojn havas;  
tre obstina, saĝa kaj sentema.

Ho, CI, DON KIĤOTO NOBLA!  
CI HISPANO ĉiam estas;  
ĉiam Cia celo restas  
ĉe ni por la BON' multobla!

#### KULTURO

Mirinda, antikva, hispana Kulturo:  
kaj estas impresa, afer' kurioza,  
ja CIAJ la konoj pri l'Arto, pri Juro,  
pri ĉia profunda Scienc' serioza,  
samtempe tre grava la Literaturo.  
Hispana civilizaci' grandioza!  
Okazis tiele dum ĉiuj Epokoj,  
kaj tion ĉi pravas restaĵoj ĉe lokoj.

De l'prahistoria mistera Epoko  
hispanaj la grotoj ja kaŭzas surprizon,  
ĉar belaj perfektaj pentraĵoj sur roko  
elmontras superan prapatrcivilizon  
ĉe Grot' «Altamira», pro kies la belo  
kaj la perfekteco, supere tre grandaj,  
la Groton alnomis «Sikstina Kapelo».  
De ĝi, plej perfektaj «bastonoj komandaj».

Kaj dum jarcentara militepopeo  
fariĝis la lando, kaj spite de ĉio,  
impona vastega mirinda muzeo  
laŭ kvazaŭ farado de la fantazio:  
kaj jen akvaduktoj, teatroj, ŝoseoj,  
kaj pontoj romanaj kaj same remparoj;  
arabaj banejoj, palacoj, moskeoj,  
remparaj kun pordoj kaj eĉ «Alkazaraj» (1);  
kaj jen Katedraloj, Preĝejoj, Kasteloj...  
Romana, araba, gotika la stiloj,  
kaj la renesancaj, barokaj, juveloj;  
eĉ la mudeharaj kun tipaj graciloj  
laŭ arto de l'Maŭroj tre spertaj pri beloj.

Pentrist' «Altamira», Velazquez kaj Goja,  
vidiĝas genia de l'Art' Triunuo  
plej granda de l'Mondo. Kaj estas samvoja  
kaj glora la Arto de nia Statuo.  
Pro ĉio Hispano sin sentas tre ĝoja!

Reflektoj metalaj de la Ceramiko  
ne estas egalaj... Ĉu Diartifiko?

Pri forĝo de l'fero, metala laboro,  
jen la konsidero: Simila la gloro!

Sĥak, grafo germana, kun granda kulturo  
pri l'dramo hispana, pri literaturo  
de nia popolo, tre firme asertis  
pri granda la rolo ilia. Li spertis.

Esprimas la Grafo, per diroj lojalaj,  
laŭ sia la trafo: al dramoj italaj,  
al anglaj, al francaj, jam estis influoj  
tutĝuste bonŝancaj, jam estis instruoj,  
el verkoj tre famaj de niaj aŭtoroj,  
el verkoj la dramaj tre plenaj je gloroj.  
Malnova poemo de l'«Mia la Cido»  
kun glora la temo kaj granda la fido.

---

(1) Palacfortikaĵo.

Mirindaj sen vantoj de Jorge Manrique (1)  
la strofoj de l'kantoj. Li verkis lirike.  
Jen de l'Mezepoko Romancoj lirikaj  
teatra la voko al verkoj klasikaj.  
Kaj Lope de Vega fariĝas la patro  
la plej superega de nia Teatro!

De l'sprita Quevedo (2), genia, korflama,  
verkara bukedo fariĝas mondfama.  
Kaj tre romantike la Sankta Tereso  
ja verkis mistike kun monda sukceso,  
ĉar estis ŝi saĝa, kun granda pasio,  
samtempe kuraĝa, kun bel' kaj gracio.

Kaj jen «Don Hiĥoto» plej granda novelo,  
samtempe la moto al JUSTA la CELO.

Kaj la Poezio laŭ gloroj ja floras;  
kaj la Komedio tutsame ja gloras.

Ĉu l'Arto Muzika? Belega, subtila,  
varia, mistika, ravanta, gracila.  
Ho, kiaj bonŝancoj kaj ĝojoj al koro  
pro l'kantoj kaj dancoj de nia-folkloro:  
motiv, melodio, tre riĉe varia;  
de l'kant' poezio ĉu estas pasia,  
ĉu gaja, dolora, kuraĝa, kontenta,  
funebra, ĉu glora, supere tre senta...

#### ELTROVO DE AMERIKO

Iam Herkules' starigis, kvazaŭ tronon,  
sur la promontoron Gibraltar',  
tre videblan mirigantan la kolonon,  
kie kuniĝadas Mar' kun Mar'.  
Kaj sur ĝin gravuris—Dio fanfarona  
kaj fiera!—vantan la devizon,  
kiu estis longedaŭre tre admona  
kaj eĉ naskis timon kaj surprizon:  
«De ĉi tie jam neniŭ preterirŭ,  
ĉar jen de la Tero certa fino  
ĉe la ombra Atlantika Mar', ne miru,  
laŭ dekretis Forto de l'Destino!»  
Sur afrikan la kontraŭan promontoron,  
ankaŭ ja la Di' starigis saman  
la kolonon avertantan... Ĉu doloron?  
Ili havis tradicion faman!

(1) Prononcu Horĥe Manrique.

(2) Prononcu Kevedo.

Sed disfalon de la Dioj vi jam scias,  
kaj potencon grandan de l'Scienco;  
tial Hom' studadis longe kaj konscias,  
per tre firma sia pacienco:  
«Preter l'Atlantika Maro, NOVAN MONDON;  
la planedon nian, GRANDA SFERO;  
nu, navigacii tial tutan rondon  
de la sfera globo, de la Tero».  
Homo planas la vojaĝon sen deteno;  
diversfoje kaj eĉ diversloke  
ĝin proponas; bedaŭrinde la ĉagreno  
trafas lin. Lin ridas tute moke  
kunvenanta Doktorar' ĉe Salamanc (k) a,  
antaŭ kiu li science planas.  
Pri ĉi tio Doktoraro sciomanka  
liajn planojn tute ja ĉikanas;  
sed per prava l'argumento aŭ aserto.  
Doktoraro tute ne refutas,  
kontraŭ la genia fundamenta sperto  
tre malprave ili nur disputas.  
Kaj ĉagrene, por pravigi sian diron,  
inspirite de genia blovo,  
al la Doktoraro kaŭzas grandan miron,  
demandante: «Kiel staros ovo?»  
Ho, ve! Jen la Doktoraro en konfuzo.  
Dume, do, Kolumbo prave ridas,  
mildfrapetas ovopinton, jen la ruzo:  
Doktorar', staranta, ovon vidas!  
Doktorar' komprenas la Kolumban mokon,  
kaj fiera, tuje ja koleras...  
De Kolumbo ne atentas pravan vokon;  
des pli, do, Kolumbo malesperas.  
Kaj Kolumbo senespera, malfeliĉa,  
jam en Monaĥejon sin direktas,  
ĉar, malsana, ofendita kaj malriĉa,  
frenzulo tute li aspektas.  
Al monaĥo tre amika li aliras  
serĉi resaniĝon kaj konsolon...  
Tre inteligenta la monaĥo diras:  
uzi sian la plej altan rolon,  
fari oferegojn, kanti piajn preĝojn,  
ŝpari eĉ neniajn la influojn  
por konvinki Katolikajn la Gereĝojn,  
klarigante ĉiajn la instruojn...

Jen rezulto: por ekipi karavelojn,  
la Reĝino klera kaj tre saĝa  
pruntedonis ĉiujn siajn la juvelojn.

Ho, Elizabeto tre kuraĝa!

Jen antaŭen ŝipoj kaj ne multenombraj  
navigaciantaj de la maro

—spite de l'Devizo—tra la ondoj ombraj,  
longedaŭre kaj sen tim' al baro,

ĉar timonojn regas de la karaveloj  
tre kuraĝe sperte firmaj manoj,

kaj manovrojn, sur la mastoj, de la veloj,  
kontraŭ la bloveg' de l'uraganoj.

Tamen ja laciĝas peze la rigardo  
ĉu en akvon, ĉu en la lazuron;

pro ĉi tio ankaŭ el multuloj l'ardo.

Fine, ĉio naskas la teruron:

dum la karaveloj brave fendas ondojn,  
ŝipanaroj bedaŭrinde celas

tuj returneniri, ili formas rondojn,  
kaj tumulte ili eĉ ribelas.

Havas Kavaliroj kun Kolumb' kuraĝon,  
por la ŝipanaron devalvoki,

kontraŭstari energie la malsaĝon,  
la ribelon nepre tuj sufoki,

rehavigi al ŝipanoj la esperon...

Fine, oni aŭdas kvazaŭ hore  
kaj entuziasme krii: «Teron, Teron!»

Kaj kroniĝas l'entrepreno glori!

De la Katolikaj Reĝoj dank' al volo,  
la plimulto el la «Nova Mondo»

ja sumiĝas al Hispana la Popolo  
laŭ tre granda «Familia Rondo».

Ĉar CI, per Scieco kaj kuraĝo penis  
trovi vojojn, landojn, jam la horo

de l'triumfo miriganta fine venis,  
kun ĝi, la plej granda cia glori!

\* \* \*

## RONDNAVIGACIO DE LA MONDO

Ciaj ŝipoj estis la unuaj  
kiuj faris rondovoĵon  
de la Ter' tra l'bravaj ondoj blujaj  
de la Mar'. Unuan fojon!

De ĉi tiu l'urbo de l'Kongreso,  
tra l'river' Gvadalkiviro,  
estis de l'ŝiparo, kun sukceso  
granda, glora la deiro,

ĉar por la mistera rondvojaĝo  
ja kuniĝis pacienco,  
preparado, fide kaj kurajo,  
harmonie kun scienco.

Al CI, HISPANUJO, varme kara,  
apartenas tia gloro!...  
CI cin montris ĉiam malavara  
al ofera la laboro;  
ĉiam, ĉie, CIA koro  
estis aventura kaj bonfara!

### FINO

De la pinto de la masto aŭ de l'stango,

CIA FLAG' radias laŭ koloro  
de potence vivoforta glora sango  
kaj de disigita riĉa oro!

laŭ koloro de l'zenita brila suno  
kaj de l'pektagiĝo hele klara!...

Ĝi ankoraŭ flirtas glоре dum la nuno,

GLORA HISPANUJO, lando kara;  
ĉar se CI ja perdis multajn koloniojn,  
tio absolute nun ne gravas,

ĉar CI naskis multenombrajn la NACIOJN,  
KIUJN CIA FLAGO tute ravas!

ho, CI, HISPANUJO, des pli mi CIN amas,  
kaj feliĉon al CI mi deziras,

ju pli al NACIOJ pliaj mi fratflamas  
kaj TUTMONDAN PACON mi sopiras  
per fratiga bela lingvo ESPERANTO,  
kiun uzis mi por tiu ĉi la KANTO!!

# **Festoj, Vizitoj, Ekskursoj, Kunvenoj, kaj Diversaĵoj**

## **TAGON 5.<sup>a</sup> de Novembro**

### **Vizito al la Katedralo**

La 5.<sup>a</sup> de Novembro, unuan tagon de la Kongreso, je la tria posttagmeze la samideanaro vizitas la grandiozan mirigantan Katedralon, kiu estas riĉega muzearo kaj kies priskribo postulus multenombrajn paĝojn. Ĉefe, detale, la gekongresanoj vizitas: la renesancan kapelon reĝan, en kiu kuŝas Alfonso X<sup>a</sup> la Klerulo, la Konkirinto kaj Sankta Reĝo Ferdinando, Petro I<sup>a</sup>, k. c., kaj ĝian trezorejon, en kiu altvaloraj juveloj artplenaj eĉ historiplenaj estas gardataj; la grandan sakristion, ankaŭ renesancan, kun ĝia multvalora kolekto el artaĵoj, juveloj, libroj, ŝtofoj, k. c., sufiĉaj por starigi abundan, varian, riĉegan muzeon.

Bedaŭrinde manko da tempo ne permesis viziti la ĉambron en kiu oni gardas la pastrajn vestarojn, kiuj per si mem estas kvazaŭ impona alispeca muzeo, ĉar nur por sola speciala procesio estas 200 riĉajn pastrajn vestojn; kaj fine la plimulto, ĉar estis iuj malkuraĝaj por la suprenirado, supreniris la deklivon en la sonorilejon de la majesta, gracia, plenarta kaj ridetanta turo Giralda, kaj la plimulto ĝuis birdorigarde allogantan vidaĵon de la urbo plena de artaĵoj, legendoj, tradicioj kaj historiaĵoj; kaj la mirindan panoramon de la fruktodona ĉirkaŭanta kamparo en kiu la kantita kaj kantata rivero Guadalquiviro milde fluas kaj kunigas la urbon kun la maro.

### **Oficiala akcepto en la Urbestrejo**

La Urbodomo de Sevilla estas granda meritplena juvelo de la renesanca stilo. En la Gildejo je la kvina posttagmeze solene akceptas la Esperantistojn la Urbestro Sr.<sup>o</sup> Díaz Molero, apud kiu staras dekstren kaj maldekstren respektive Sr.<sup>o</sup> Azorín kaj pastro Jerónimo de Córdoba.



La Urbestro sin turnas elokvente al la gesamideanoj, bonvenante ĉi tiujn je la nomo de Urbokonsilantaro kaj tial de la loĝantoj de Sevilla, kiel li konstatis dum la parolado de la malferma kunsido; ke la gesamideanoj, kunvenantaj en la salono, en kiu je la XVI<sup>a</sup> jarcento kunvenis la kavaliraj Dudekkvaruloj de la Urbo, kiu antaŭe grave laboris por ĝi, lasante heredaĵojn al la posteuloj, ankaŭ gravege laboras por herediĝi la venontajn esperantistojn, kiuj profitos la superegan bonaĵon de la nuntempe semata esperanta idealo, kiu iam kunigos ĉiujn homojn de la tuta terglobo, ĉar la progreso de Esperanto pli kaj pli kreskas kaj firmiĝas, pro la alta kaj noblega ĝia celo, respondanta mirinde je la *esperemo* konstatata de la nomo de la lingvo «se ni povus vidi ĉiujn kune ĉi tie, ni povus konstati tian grandan firman esperemon, kiu faras Esperantismon *venkonta nepre*». Li aldonas, ke la akcepto devenas de la bonvolemo, intereso kaj simpatio de la Urbeŝtaro al nia laboro. Granda ovacio premias la urbeŝtran paroladon.

Sr.<sup>o</sup> Azorín, kiel prezidanto de la Kongreso, dankas Sr.<sup>o</sup> Díaz Molero kaj Urbeŝtraron, pro ilia akcepto kaj korajn esprimojn, des pli ĉar Esperanto ne estas lingvo por la venonteco, sed vivanta kaj efika lingvo de la nuntempa epoko, por ĉiaj aferoj de la homa kapableco, ĉar en ĉiuj rondoj de la homa aktiveco Esperanto konstatigas, ke ĝi ne mortas, ĉar neniam mankos al ĝi, kiel mankis al latina kaj greka lingvoj, la spirito, la animo, kiu sidas ĉe koro ĉies. Esperanto venis al Sevilla por ampleksigi, kreskigi, sian spiriton per tiu mirinda spirito de la fama urbo; por beligi sian spiriton per la gracio speciala, rimarkinda alloga de la plensimpatia Sevilla, ĉar se vere estas urboj pli grandaj, ol Sevilla, kaj ankaŭ plenaj de arto kaj de beleco; Sevilla posedas tiajn spiriton kaj gracion, ke ni venis alproprigi al nia idealo tiujn spiriton kaj gracion. Li deziras al la Ekspozicio Ibero Amerika plenan sukceson kaj ekkrias huraojn, kiuj unuvoĉe tondradas dum iom da tempo.

Tuj la Komitato por Iniciativoj kaj Turismo disdonas belegajn, ilustritajn gvidlibrojn de Sevilla, kaj fine la Urbeŝtaro regalas per abunda bongustega lunĉo la gesamideanaron dum la urba muzikistaro artege ludadas. Post subskribado en la Albumo de la Informejo pri Turismo, la samideanaro finas la feston per «La Espero» akompanate de la muzikistaro.



Oficiala akcepto en la Urbestrejo.—La gekongresanoj en la Gildejo



En la ĝardenoj de la Alkazaro  
Grupeto de Rezentantoj, fremduloj kaj belaj samideaninoj

## TAGON 6.<sup>a</sup> de Novembro

### Vizito al la Alkazaro

Je la naŭa matene, jen okazanta la vizito al la Alkazaro, al ĉi tiu rimarkinda konstruaĵo en kiu la araba stilo vidiĝas gracie plenarte, impresigante tiel kvazaŭ vizitanto vivas ĉe fantazia neimagebla konstruaĵo, en plena revo de kiu eltiras la klaraj, laŭtaj, esperantaj klarigoj ĉu pri la arto, ĉu pri la historio, kun anekdotoj kaj rimarkigoj plezurigantaj la viziton. Sekve estas la vizito al la banejo de Maria Padilla kaj al la ĝardenoj, kiuj formas mirindan parkon plenan de palmoj, mirtoj, lonicerroj, jasmenoj k. t. p., k. t. p., fontanoj, kun belegaj perspektivoj same ĉe la malnovaj ĝardenoj, kiel ĉe la novaj; apud la belega pavilono de Karolo V.<sup>a</sup>, pozas grupe gesamideanoj por diversaj fotoj. Elirante la Kongresanaro vizitas ĉambrojn malnovajn, ankoraŭ ne bone aranĝitajn, de la tempo de Petro I.<sup>a</sup>, kiu en unu el ili starigis tribunalon por fari gravajn juĝojn, kaj en kiu oni senkapigis juĝitojn.

### Vizito al Muzeo de Pentrarto

Sekve okazas vizito al riĉega Muzeo de Pentrarto, en kiu mirigante vidiĝas la tutmondfama Skolo de Sevilla. Sr.<sup>o</sup> José Rico Cejudo, tre klera kaj meritplena pentristo gvidas la gesamideanojn, klarigante ĉion detale eĉ tradicie, legende aŭ anekdote, en hispana lingvo, kies klarigojn fidele eĉ foje bonhumore, laŭte, klare kaj precize, oni tradukas esperanten. Kion diri pri ĉi tiu muzeo, en kiu oni konservas multenombrajn pentraĵojn de Murillo, Zurbarán, Valdés Leal, Herrera (la Maljuna kaj la Juna), Roelas, Pacheco (majstro kaj bopatro de Velázquez), en kiu ankaŭ oni konservas skulptitaĵojn mirindajn, al kiu ĵus oni aldonis multenombrajn pentraĵojn, skulptitaĵojn, riĉajn ŝtofojn, armilojn, porcelanaĵojn, k. t. p., tutan kolekton da artaĵoj, kiujn longedaŭre akiradis artamanto, kiuj, en la grandega salono, en kiu oni instalas ilin, formas per si mem altvaloregan artan muzeon? La diroj mankas, pensu, revu; kaj la penso kaj la revo ne estos sufiĉa por kompletigi la realaĵon. En la sama konstruaĵo, amase instalita, estas la riĉa arĥeologia muzeo.

## Diversaj vizitoj

Posttagmeze, je la 3.<sup>a</sup>, la gekongresanoj libere, laŭ plaĉo kaj propra intereso, aliras por viziti monumentojn, kvartalojn, parkojn, iuj piediras viziti Jesuon de la Granda Povo, ĉu la brunan, gracian Dipatrinon, kiun oni alnomas la *Macarena*; ĉu la domon de Pilatos, por ekstaze admiri veran riĉegan muzeon el azuleĥoj, eĉ de la XI.<sup>a</sup> jarcento, kaj klasikajn araban, gotikan kaj renesancan stilojn; ĉu la Hospitalon de la Sankta Bonfaremo, kiun pentinta diboĉulo, kavaliro Miguel Mañara, per sia sindonemo, starigis ĉe loko de la malnova ŝipkonstruejo, el kiu ankoraŭ vidiĝas muroj kaj arkaĵoj, por praktikadi ĉiam bonfaremon, tiamaniere, ke la kavaliro eĉ konstruigis akvuĵeton ĉe flanko de la enirejo por ke soifantaj hundoj trinku (ankoraŭ restadas la akvuĵeto) kaj tial ke en ĉi tiu Hospitalo oni povas ĝui famegajn verkojn de la skulptarto kaj de la pentrarto, la allogan tradicion pri rozarboj plantitaj de la kavaliro, kiuj ankoraŭ roziĝas abunde, eĉ aŭskulti, de simpatiaj naivaj lipoj kun varma dirmaniero, arĝentan voĉon de monaĥino iomete kolera kontraŭ la fremduloj aljuĝantaj la kavaliron Mañara diboĉa iam; ĉu la kvartalon Triana, kie loĝas multenombraj ciganoj, eble por fandiĝi ĝoje pro la fajra rigardo de brunulino, aŭ por koni sian estontecon, laŭ la melodias antaŭdiroj de ciganino leganta dank'al akra rigardo de ŝiaj karbokoloraj okuloj la horoskopon sur sian manplaton; ĉu la roman-arabajn remparojn kaj turon de Don Fadrique; ĉu la mirindan anguleton de la plej tipa Kvartalo Santa Cruz, en kiu staras fera kruco, artaĉefverko de la forĝo, kaj en kiu kuŝas la restaĵoj de la tutmondfama pentristo Murillo... Neeble priskribi, ĉar la ĉeestantaj samideanoj estas multenombraj kaj Sevilla entenas mirindaĵojn ĉe ĉiu strato, ĉe ĉiu anguleto, laŭ nekalkulebla proporcio.

### TAGON 7.<sup>a</sup> de Novembro

#### Floraj Ludoj

Dum la mateno, okazis tiu Literatura Festo, jam raportita detale, sur alia loko de la Libro.

Vespere, kvankam difinita por la dua kaj duono posttagmeze la oficiala vizito de la kongresanaro al la diversaj Palacoj de la Hispanamerika Ekspozicio, la senĉesa pluvado devigas la komitaton inviti la gesamideanojn fari laŭ memvolo, pro kio ĉi tiuj disiĝas; sed esperantistoj estas kuraĝaj kaj kulturavidaj personoj, kiujn nenio timigas, kaj dise, dum la tuta posttagmezo, alkuras laŭ eblo al la Parko de María Luisa por viziti la palacojn, kaj je la vesperiĝo, jen preskaŭ la plimulto ĉe la Reĝa Pavilono post vizitado de la aliaj konstruaĵoj kaj trakurado de la mirinda parko sub dense griza nubegaro ĉiam akvoverŝanta, el kie ĉiuj revenis en la urbon per tramoj por ĉeesti al la kunveno de la Kongreso, okazonta je la sesa vespere.


## TAGON 8.<sup>a</sup> de Novembro

### Ekskurso al Aracena

Je la 8.<sup>a</sup> matene deiras la plimulto el la gekongresanoj per tri grandaj aŭtobusoj kaj du aŭtomobiloj al Aracena. La vetero verŝajne ŝanĝas, pliboniĝas kaj ĝojo ekregas ĉiujn, ĉar nuboj flugas, ŝiriĝas, aperas la belega andaluzia bluega ĉielo, kaj la suno montriĝas plenbrila, helega, ĉe la nekomparebla andaluzia lazuro. La motoroj ritme bruas; miksiĝas la bruo kun la kantoj, ridoj, anekdotoj, spritaĵoj, k. c., de la ekskursantoj. Halto: jen la malnova monaĥejo de Sankta Isidoro de l'Kampo, kiun starigis la heroa nobelo Guzmán la Bonulo pro pieco kaj por ke nur oni enterigu lin kaj lian edzinon en la preĝejo; jen la maŭzoleoj kun kuŝantaj statuoj; sed la filo volis ripozi eterne apud la karaj gepatroj kaj tial li starigas najbaran navon, por ke ĝi ricevu lian korpon kaj tiel estis. Granda bedaŭro estas ke la monaĥejon ne atentis aŭtoritatuloj, pro kio barbareco ĝin kripligis terure, tamen ĝi ankoraŭ posedas gravegan juvelon, kiu mirigas la klerajn turistojn, artan meritplenan freskon.

Al la aŭtobusoj, kaj antaŭen, al romana cirko de Itálica: imponaj ruinoj, impresigaj restaĵoj, ankaŭ kripligitaj de neatentemo kaj malzorgo!

Paf, paf, paaaf...! Tra bela kamparo, sur tute glata ŝoseo, rulas la



Konungsambroti, or the noble A. ...  
Assistants, ...  
C. ...  
P. M. ...  
L. ...

aŭtobusoj. Ambaŭ flanken de la ŝoseo, jam en la montaro, arbaroj el korkoarboj, kverkoj kaj pinoj; de tempo al tempo blankaj vilaĝoj; la pejzaĝo beliga pli kaj pli, laŭ la kamparo montariga. Jen ni en Aracena, kie ĝentile akceptas nin la urbestro kaj la tre klera paroĥestro, la du plensimpatiaj. Ĉiuj malsatas kaj avide iras al la Hotelo; ĉiuj sidas, la plimulto manĝas; malfeliĉa malplimulto ne trafas manĝaĵojn, ĉar nur estas du servistoj por proksimume cent personoj, sed la maltrafo eksplodiga laŭ bonhumoraj ŝercoj, anekdotoj, kantoj kaj ridoj, ĝis kiam bela servistino alkuras kaj, fariĝante Diino de la Abundeco, provizas bongustegajn vinojn kaj manĝaĵojn al la ŝerce protestantoj. Plenplena kaj dankantaj stomakoj reflektiga vizaĝoj ĉies.

Ĉe la stratoj multenombraj gevilaĝanoj ĉirkaŭas Sr.<sup>o</sup> Christensen (kies giganta korpo entenas gigante grandaniman koron) kaj la inteligentan kaj plenspritan aŭtobuskondukiston de nia veturilo; Sro. Christensen instruas kanton al geinfanoj:

«Lernu Esperanton!

Uzu ĝin, uzu ĝin...!»

Kaj tuj la geinfanoj akorde kaj kun bona prononcado ĥore kantas, eĉ la ŝofero kaj aliaj kantas. La geinfanoj ne apartiga de la simpatia usonano kaj de la ŝofero dum la irado al vizitoj, ĉar la du enamikiĝis, kaj, kvankam la unua parolas esperante kaj la dua hispane kaj genie mimike, iomete interkompreniga kaj tute per helpo de la ekskursantoj, dume la geinfanoj jam sole ĥore kantadas la lernitan kanton. Agrablega, amuzplena kunirado pro la spritaĵoj, anekdotoj, ŝercoj kaj bonhumoro, kiujn naskas la interrilatiga inter Sr.<sup>o</sup> Christensen kaj la ŝofero.

Jen ni plengojaj, ĉar la vetero fariĝas favora, en la paroĥejo admirante ĝiajn artjuvelojn, precipe la jam faman Krucumiton, kiun oni atribuis al genia skulptisto Montañés, sed kiun skulptis ne malpli genia majstro de la skulptarto Juan de Remesal, laŭ dokumentoj ĵus trovitaj: Sufiĉus nur ĉi tiu ĉefverko por alirigi turistojn al Aracena, ĉar ĝin rigardante, ŝajnas esti antaŭ lastelspiranta Jesuo vidiganta la lastajn vivmovojn sur la kvazaŭ fleksiĝantaj fingroj de la manoj kaj per la salivŝaŭmo eligata de la agonio elspiro; sed vere, reale antaŭ Jesuo el karno kaj ostoj, pro la realeco de la verko kaj genie natura esprimo de muskoloj, haŭto kaj cetero de la skulptitaĵo, kiu vidigas la mirindan anato-

mian kono de la artisto. Sed krom ĉi tiu ĉefverko, posedas la paroĥejo riĉajn pentraĵojn, juvelojn kaj pastrajn vestarojn. Sekve supren, supren en la monton sur kiu staras belega maŭra turo, restaĵo de la malnova kastelo, hodiaŭ turo de la preĝejo, kiun je la XIII<sup>a</sup> jarcento starigis la Kavaliroj de la Templo, konstruaĵo kiu vidigas transirojn de stiloj, de la romana en la renesancon, kaj kiu, koncerne azuleĥojn, forĝitaĵojn, pentraĵojn k. c., estas mirinda muzeo de novaj kaj malnovaj artaĵoj.

De la monteto la ĉirkaŭanta kamparo prezentas al ni pentrandan panoramon kaj la urbestro kaj paroĥestro montras al ni lokon, kie kuŝas la restaĵoj de la famega Viriato, de la heroega militestro, kiu multfoje venkis la romanojn, kaj kiun perfido pagita de ĉi tiuj mortigis. Kaj tuj suben, en la internaĵon de la monteto, en la Groton de la Mirindaĵoj, ni iras eskortataj de publiko, precipe de geknaboj kaj geinfanoj, kiujn komandas Sr.<sup>o</sup> Christensen, kaj kiuj nelacigeble kantadas «Lernu Esperanton...!»

La eskorto restas ĉe la pordo de la groto kaj jen ni ĉe la internaĵo: bone instalita elektra lumigado kaj bone aranĝitaj irejoj, ŝtuparoj, kaj pontetoj; akvolevanta maŝino provizanta la urbeton por ĉiaj bezonoj. Kion diri pri la koridoroj, salonoj, ĉambroj, labirintoj, riveretoj, lagoj, kun stalaktitoj, stalagmitoj kaj ĉiaj kalkaj kristaliĝoj ornamantaj murojn plafonojn eĉ pavimojn? La fantazio ne povas imagi tiom da mirindaĵoj, kies formiĝon grandparte estas netroveblaj en aliaj grotoj, eĉ en la plej famaj; kies specialaj kristaliĝoj tute delikataj kaj travideblaj, kvazaŭ kardoj kaj mirindaj bukedoj el plantoj kaj floroj diversaj, estas granda enigmo al geologiistoj plej eminentaj de la mondo, kiuj, okaze de la Geologia Universala Kongreso en Madrido antaŭ iuj jaroj, vizitis la groton, ĉar ili ne povas klarigi al si la formadon de tiaj kristaliĝoj: Aliparte, la koloriĝo de aliaj formitaĵoj estas mirinda kaj miriganta.

La groto ankoraŭ ne estas tute esplorita, nek pretigita, kaj oni asertas ke la famigitan groton «Macocha» de Ĉekoslovakujo ne estas komparebla al la «Groto de la Mirindaĵoj»; tiu ĉi supermezuras tiun de ĉiuj vidpunktoj ĉar eĉ baldaŭ la turistoj bezonos barketojn por trairi pretigotajn grotfakojn.

Noktiĝas, kiam ekbruas la motoroj kaj la veturiloj deiras post dankemaj paroloj al la urbestro kaj paroĥestro de Aracena, kiujn ni varbis al Esperanto, samtempe la geknaboj kantadas «Lernu Esperanton...!».



Dum la veturado al Sevilla en la aŭtobusoj la kontento ĉies montriĝas per kantoj, ĉu aŭdiĝas segidiljoj, ĉu kantoj de Badajoz, ĉu de Asturias, ĉu de Leono, ĉu de Valencio, ĉu de Aragono, ĉu aliaj multaj, eĉ ŝercaj, kaj en plena ĝojo ni trafas Sevilla'n, kaj fine, post bona vespermanĝo, lacigite de la vizitado kaj superĉio de la autobusa ĉ. 200 kilometra veturado, la plimulto iras liten, ĉar je la sekvanta mateno estas ekskurso al Carmona.

## TAGON 9.<sup>a</sup> de Novembro

### **Ekskurso al Carmona**

La 9.<sup>an</sup>, je la 9.<sup>a</sup> matene denove la aŭtobusoj deiras kun granda nombro da gekongresanoj al Carmona. Tra la vasta ebenaĵo ĉirkaŭanta Sevilla'n, unue, poste tra montetara kamparo, ĉie fruktodonega, belega ĉirkaŭ Alcalá de Guadaira, ni alvenas al Carmona, kie aŭtoritatuloj atendas nin. Post bonveno de tiuj aŭtoritatuloj, ni ekvizitadas: en la urbestrejo ni vidas ĉefajon, skribaĵon de la tutmondfama aŭtoro de Don Kihoto, pri impostenspezado kiel delegito de la Registaro por tiu afero; ni iras sub araban pordon de malnovaj remparoj, kiu estas admirinda, al preĝejo en kiu ni vidas artaĵojn kaj kapeleton, kiu estas la unua starigita al la Virgeco de la Sankta Dipatrino antaŭ ol decidi ŝian Virgecon dogmo; al ruinoj de la malnova Alkazaro, kiu iam estis rimarkinda juvelo de la araba stilo, pli altvalora ol la Alkazaro de Sevilla, en kiu kavaliro nobla kaj fidela je la reĝo Petro 1.<sup>a</sup>, mortigita de lia frato Don Enrique, rezistis longedaŭre defendante la filon de la mortigito. En unu el la kortoj ni vidas la laboron de tipa andaluzia ĉevaldresisto rajdanta sur bela nervōpotenca ĉevalo.

Ĉirkaŭante la urbon de la supro en la malsupron, ni admiras belan turon de preĝejo, kopiaĵeton de la gracia Giralda, la ermitejon, kiu staras ĉe la loko, en kiu staris la tendaro de la Katolikaj Gereĝoj, kiam ĉi tiuj aliris al militi Granada'n, promenejojn kaj kvartalojn de la urbo, kaj fine la malsato gvidas nin al manĝejoj de du hoteloj. Feliĉe, nia hotelmastro konstante liveras abundajn bongustajn manĝaĵojn kaj vinojn, ripetante ĉiam: «Petu, petu pli...! Manĝadu, mi provizoz...!» Certe

ĉi tiu hotelmastro estas simpatia kaj havas dankemon kaj li mem distras la kunmanĝantoj per melodioj kaj kantoj andaluziaj; fine la gesamidea-naro aklame deklaras Sr.<sup>o</sup> Christensen honora membro, de H. E. A., kies prezidanto ordenas lin per hispana kvinpinta verda stelo. Sr.<sup>o</sup> Christensen estis tute surprizata, kaj lia emocio, post la paroladeto de la prezidanto, ne permesis al li apenaŭ parolon.

Al la tre fama romana nekropolo, la plej kompleta kaj interesa:



La Kongresanoj en la urbo Carmona.—Post vizito al diversaj historiaj vidindaĵoj

cindrigejoj, cindrujoj el koto kaj vitro, ĉi tiuj tre rimarkindaj, iuj tute nedifektitaj, belega statuo, templo, funebromanĝejoj, k. t. p., de la vasta nekropolo, altiras atenton ĉies, kaj la posedanto Sr.<sup>o</sup> Bonsor komplezeme ĉion klarigas tre sperte, tre kompetente. De ĉi tie al la aŭtobusoj kaj rapide al la hejmo de Sr.<sup>o</sup> Bonsor, kiu iam estis araba kastelo de Mairena de l'Alcor: remparoj, fosaĵoj, turoj, pordoj, kaj internen en la hejmon (la posedanto aranĝis malnovajn ĉambrojn kaj

ruinojn por la moderna vivo), interesagan abunde riĉan muzeon. Tra ĉie neelĉerpebla arta trezoro elpruvanta nian mirindan ĉiaman civilizacion!

Paf, paf, paaaf...! Al Alcalá de Guadaira: jen la ankoraŭ mirinda, vasta, araba kastelo meritanta iom da zorgemo kaj tujan rekonstruon, ĉar ĝi estas mirinda rigardejo, de kiu oni povas ĝui belegajn vidaĵojn. Krepuskiĝas, denove al la aŭtobusoj; sed geinfanoj, geknaboj kaj gematuraguloj ĉirkaŭas la allogantan usonanon, kiu direktas la ĥoraron kantantan «Lernu Esperanton...!» Dum lia kunulo, la ŝofero, entuziasme klarigas al la publiko en kvazaŭ mitingo: Jen, tiu Sr.<sup>o</sup> estas ekskandidato al la prezidanteco de la Usona Respubliko, kaj lin prezentis la terkulturista partio. Mi komprenas lin. Esperanton ni devas lerni...! Fine ni povas liberigi Sr.<sup>o</sup> Christensen el la dankema publiko, kiun li regalis per la rostitaj kaŝtanoj de vendistino. «Yivu! Lernu Esperanton!» Uzu ĝin...! Diras la publiko miksanthe la ekziojn kun la bruado de la motoroj je la deiro al Sevilla. Ŝercoj, kantoj, ĝojo ĉiel esprimata estas dum la veturado.

## ANDALUZA TIPAJ NOKTOFESTO

Kiel finiĝo de la programo preparita honore de la Kongresanoj, okazis je la vespero de tiu sama tago, tipa regiona festo:

La samideaninoj de Sevilla, vestitaj per la tipaj seviljaninaj roboj kantas «segidiljojn» klasikaj kaj dancas ludante kastanjetojn, montrante okulfrape la graciecon, la flekseblecon kaj la belajn korpoliniojn de la ravaj virinoj el «la tero de la Virgulino Mario plej sankta».

Brilas koloroj, ridas humoro, zumas gitaroj, vibras diversajn kantojn, prezentas tipaj kostumoj. Neforgesebla, intima, belbrila festo!

For ĉio pasis, venis la horo de adiaŭo, ĉiam malĝojiga, kaj tiom pli kiam antaŭe oni estis inter samideanaj amikoj.

Adiaŭ karaj samlandanoj el Esperantujo! Restu neforgeseble en via rememoro la suprencelanta silueto de la turo Giralda!

Feliĉan revenon hejmen! Adiaŭ! Ĝis revido!

La Kongreso finiĝis definitive.

(Oni devas konstati ke la Kaso de la Kongreso, elspezis nenion por tiu festo.)



# INTERESA DIALOGO

en hotelo, ĉe la manĝotablo, apud raportanto

---

Sr.<sup>o</sup> Christensen.—Ni, post kvar-kvin jaroj, okazigos universalan ekspozicion en Ĉikago kaj ni deziras samtempe okazigi Universalan Kongreson de Esperanto.

Sr.<sup>o</sup> Cart.—Malfacile eŭropanoj aliros al tiu Kongreso kiu ne sukcesos, ĉar ankaŭ vi ne sentas la necesecon de Esperanto, kiel ni.

Sr. Christensen.—Vi eraras: la Usona Registaro donos facilitaĵojn por aliri, des pli ĉar ni, ju pli la tempo pasas des pli sentas necesecon de Esperanto. Ni havas milionojn da senlaboristoj; ni celas laborigi tiom da brakoj hodiaŭ neokupataj, sed ni ne povas tion fari, ĉar ni bezonas merkatojn por la produktotaĵoj de tiuj brakoj, kaj por trafi la merkatojn estas necese lerni ĉiujn eŭropajn lingvojn, pro kio evidentege vidiĝas pli kaj pli utilecon de Esperanto, kaj ni konscias ĉi tion eĉ por ŝpari tempon kaj energiojn.

Sr.<sup>o</sup> Cart.—Mi ne neas pri viaj asertoj, tamen mi iomete dubas pri la sukceso.

Sr.<sup>o</sup> Christensen.—Intima amiko kaj kunlaboranto de la ĵus elektita Hoover al la prezidanteco de Usono, kompetenta inĝeniero kaj esperantisto, kaj ankaŭ bona amiko mia, opinias same, kiel mi, kaj la du penados influi Sr.<sup>o</sup> Hoover al efektivigo de tio kion mi diris.

Ni esperu ke la diroj de Sr.<sup>o</sup> Christensen efektivigu, kaj ili vidigas intereson al nia afero, kiun ni ankoraŭ ne konsciis.

---

# R A P O R T O

pri la agado de la Komitato de la Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj,  
prezentita al la Ĝenerala Kunsido de la Ligo, okazinta  
en Sevilla la 6.<sup>an</sup> Novembro 1928.

Konsiderinte la grandan disvastiĝon de la internacia helpa lingvo Esperanto kaj la senĉese kreskantan nombron da profesiaj esperantaj societoj, la nuna Komitato—en la unua momento nur organiza Komitato—opiniis ke estus dece aligi Fervojistan Repraŝentation al tiu-ĉi gravega kultura movado kaj entreprenis la laborojn necesajn por fondi laŭleĝe la Hispanan Ligon de Esperantistaj Fervojistoj.

Tiucele oni sendis alvokon al niaj kolegoj pere de la ĵurnalaro kaj de «La Asociación», oficiala organo de la «Asociación General de Empleados y Obreros de los Ferrocarriles de España», kiu per sia kutima afableco bonvolis publikigi diritan alvokon. Sekve de tiu anonco oni ricevis el diversaj lokoj de nia lando sufiĉenombrajn aliĝojn, kio kuraĝigis nin starigi oficiale la Ligon la 17.<sup>an</sup> Aprilo 1928.

Nuntempe la Ligo estas repraŝentata en 18 lokoj kaj ĝia membraro konsistas el 4 Membrosubtenantoj kaj el 130 membroj, entute 134 membrojn, klasigitaj laŭjene:

KOMPANIOJ	NOMBRO
Norte . . . . .	58
M. Z. A. . . . .	41
M. C. P. . . . .	28
M. Z. O. V. . . . .	2
Andaluces . . . . .	2
F. C. de Langreo . . . . .	1
F. C. del Sur . . . . .	1
Alcantarilla a Lorca . . . . .	1
TUTE . . . . .	134

Malgrandaj estas la suprecititaj ciferoj sed, spite ĉio, ili estas tre kontentigaj se ni konsideras la epokon, kiu sekvis la starigon de la Ligo, kiel organizan periodon, dum kiu ni estis devigataj dediĉi nian tutan tempon al la malaperigo de la baroj, kiujn oni facile trovas kiam oni propagandas inter skeptikuloj, kaj super ĉio al la forigo de la erara opinio de multaj personoj pri la vera senco de nia idealo.

Nun, kiam ni jam kalkulas sur pli grandan nombron da membroj,



Hispanaj fervojistoj ĉeestantaj en la Ĝenerala Kunsido de la Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj.

kaj kiam la esperanta semo ekburĝonas, ni kredas ke la momento alvenis por fini la organizan periodon kaj dediĉi ĉiujn niajn fortojn al la efektivigo de metoda propagando de la internacia helpa lingvo Esperanto kaj de nia Ligo inter niaj kolegoj, pere de persona alparolo kaj ankaŭ de publikigo de artikoloj en la profesia preso, ĉefe en La Asociación, al kiu ni restas vere dankaj por ĝia efika apogo.

Ankaŭ estas citinda la agemeco de niaj Delegitoj kaj Subdelegitoj,

speciale tiu de nia Delegito en Barcelono Sr.<sup>o</sup> Jaime Miró kiu varbis 33 membrojn; tiu de nia Subdelegito en Madrido Sr.<sup>o</sup> Baldomero González kiu varbis 25 membrojn kaj fine tiu de nia Delegito en Gijón Sr.<sup>o</sup> Alberto M. González kiu publikigis tre bonan propagandan flugfolion, ekzemploj ĉiuj vere imitindaj.

Tute same ni devas konigi al vi novaĵon, kiu tre gajigis nin: multaj el niaj membroj jam komencis lerni Esperanton kaj ni esperas ke ceteraj imitos ilin, ĉar tiamaniere ili povos ĝui post nelonge la ĉarman literaturon esperantistan kaj la intereseĝan intersanĝon de korespondado kun kolegoj de la tuta mondo. La lernado de la lingvo, kiel vi scias, kutime daŭras tri aŭ kvar monatojn se oni dediĉas al ĝi kelkajn momentojn ĉiutage, ĉu ĉeestante la kursojn, ĉu lernante per si mem, tial ke la lingvo estas tre facila.

Antaŭ ol fini tiun-ĉi mallongan Raporton, la Komitato havas la honoron esprimi al la estimataj Liganoj ĉi-tie ĉeestantaj kaj al tiuj, kiuj ne povis veni al ni pro profesiaj devoj, nian plej sinceran dankon por via sindona kunagado favore de la Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj kaj de la grandioza esperanta idealo, senkompara simbolo de homa progreso.

La Prezidanto,  
LUIS RODRÍGUEZ ESCARTÍN.

La Sekretario,  
EMILIO DEL BARRIO.

---

### ADRESO DE LA LIGO:

LIGA ESPAÑOLA DE FERROVIARIOS ESPERANTISTAS

APARTADO 820

MADRID

---



# DECIDAJ

de la Ĝenerala Kunsido de la Hispana Ligo de Esperantistaj Fervojistoj,  
okazinta en Sevilla la 6.<sup>o</sup> Novembro 1928, ĉe la Kunveno  
de la Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando,  
je la oka horo vespere.

- I.—Plivastigi la esperantan propagandon nur inter la fervojistaro, tial ke la propagando por la ĝenerala publiko estas efektiva pere de Hispana Esperanto-Asocio kaj ceteraj Esperantaj Societoj.
- II.—Malfermi esperantajn kursojn ĉe la «Asociación General de Empleados y Obreros de los Ferrocarriles de España» kaj «Colegio de Huérfanos de Ferroviarios», en konvena momento.
- III.—Interesigi la «Asociación General de Empleados y Obreros de los Ferrocarriles de España» por ke ĝi bonvole publikigu propagandajn artikolojn de ni sendotaj.
- IV.—Por faciligi la propagandon de la Ligo, al ĉiu membro, kiu prezentos novajn aliĝojn—pere de la Delegito aŭ rekte—oni donacos al li ekzempleron de PRAKTIKA KURSO DE ESPERANTO aŭ kiu ajn alian esperantan verkon samvaloran, po ĉiu deko da membroj prezentitaj.
- V.—Presigi la Regularon de la Ligo kaj aldoni al ĝi kelkajn propagandajn notojn.
- VI.—Laŭperiode publikigi cirkuleron pri la Liga movado kaj ankaŭ pri la tutmonda.
- VII.—Kiam estos eble, la Komitato publikigos broŝuron en Esperanto pri la Hispanaj Fervojoj, de la teknika kaj turisma vidpunktoj.
- VIII.—Presigi anoncon pri la Ligo sur la Oficialajn Horarlibrojn de hispanaj fervojoj, en deca tempo kaj konvenaj kondiĉoj.
- IX.—Fine oni decidis sendi saluttelegramon al la «Asociación General de Empleados y Obreros de los Ferrocarriles de España».

## LASTAJ VORTOJ

---

Por fini la priskribon pri la VII.<sup>a</sup> Kongreso, kiel ekstremo kiu kuntuŝiĝas kun la gravaj sinceraj esprimoj de la amata kaj respektinda prezidanto de H. E. A., nenio pli trafanta ol la diroj de la plej juna kongresanino, de la naŭjara knabineto de «Cheste» Amparito Remohi Haro, kiam ŝi salutis la Kongreson, ĉar estas vortoj plenplenaj de zamenhofsento stimulantaj al ĉiuj:

«Ni la junaj «ĉestaninoj», vidante kiel niaj plenkreskuloj post longa kaj peniga kampara laborado, antaŭ ol ripozi, iras vespere al la esperanta grupejo por konkiri (laŭ tio, kion ili diras) la tutmondan kaj ĉiaman pacon per Esperanto; ni, la etulinoj, por esti indaj je ili, forlasante iujn el niaj ludoj kaj amuzaĵoj, ankaŭ soldatiĝas en la por paca armeo kaj lernas kaj propagandas tre entuziasme la fratigan lingvon.

Miaj kamaradinoj kaj mi petegas al ĉiuj, al vi, karaj gekongresanoj, ke vi konvinku viajn filinojn por lerni Esperanton; ĉar ni havas gravan rolon plenumotan por la progresado de la Homaro; ĉar ni estas la estontaj patrinoj, kaj, nature, ni devas meti la unuan ŝtonon en la edukado de la venonta generacio.

Ni, do, devas nepre zorgi, por ke niaj idoj, de la unua momento, nur aŭdu pacajn kaj amajn parolojn de ĉiuj kaj por ĉiuj, kaj kiujn ili lernos kaj esprimos poste per la neŭtrala kaj fratiga lingvo Esperanto, la dua post la gepatra lingvo; nepre ni devas eviti, ke al ili okazu same kiel al ni, ĉar ni de la naskiĝo preskaŭ nur aŭdis malamajn venĝajn kaj militajn parolojn, kiuj tiel grave vundas kaj venenas la junajn korojn.»

Ni sekvu la vojon montritan de la du ekstremuloj; ni senripoze, interkonsente, konkorde, agadu por Esperanto, kiel diktas homama sperta koro de la Prezidanto de H. E. A. travivanta batalvivon kaj la juna koreto fremda je ĉia pasio kaj plena de pura sento de la plej juna membrino el la H. E. A., knabineto Amparito. *Nelacigeble antaŭen!*

---

## ESPERANTAJ FLAGOJ ĈEESTANTAJ AL LA KONGRESO

---

De la Grupo Esperantista «Antaŭen», el Madrido.—Standardisto: Fin.<sup>o</sup> Lucrecia de San Antonio.

De la Grupo Esperantista «Gajeco kaj Laboro», el Tocina (Sevilla).—Standardisto: Sr.<sup>o</sup> Antonio Carrasco.

De la Grupo Esperantista «Lumradio», el Cheste (Valencia).—Standardisto: Sr.<sup>o</sup> Eugenio Viadel.

De la Grupo Esperantista Pacense, el Badajoz.—Standardisto: Sr.<sup>o</sup> Nicolás de Pablo.


De la Grupo Esperantista «Frateco», el Zaragoza.—Standardisto: Fin.<sup>o</sup> Irma Maynar.

De la Grupo Esperantista, el Oviedo.—Standardisto: Sr.<sup>o</sup> Luis García Fernández.

De la Grupo Esperantista, el Córdoba.—Standardisto: Sr.<sup>o</sup> Juan Serrano Olmo.

De la Grupo Esperantista, el Sevilla.—Standardisto: Sr.<sup>o</sup> Fernando Coello.

---



Insigno de la Kongreso

KVAZAŬ

# EPILOGO

---

## AL HISPANAJ ESPERANTISTOJ


La VII.<sup>a</sup> Kongreso Nacia de Esperanto en Sevilla estis plena sukceso; tion oni ŝuldas krom al la alta protektado de nia Reĝa Moŝto Alfonso XIII.<sup>a</sup> (D. L. G.), al la apogo morala kaj materiala de la aŭtoritatoj de la urbo; al la helpo de multaj aliaj aŭtoritatoj, asocioj kaj privatuloj naciaj; al la sindonemo, laboremeco kaj interkonsento de la hispan-esperanto-asocianoj; ne malpli al organizintoj kaj, fine, al la frata kunagado de la Kongreso-partoprenintoj kiuj per sia bonintenco, serena, ĝentila kaj harmonia diskutado interkonsentis pri diversaj aferoj aŭ envicigis en la irotan vojon la problemojn postulantaj, ke la tempo pasu por esti solvotaj. Ni danku, do, niajn protektantojn kaj kungratulu nin pro la sukceso atingita, sed, ni ne dormu kuŝante en la sulko, sur niaj laŭroj. La VIII.<sup>a</sup> Kongreso okazonta en Oviedo la venontan Septembron (1929) frapas urĝe niajn pordojn instigante nin al la daŭrigado de la laboro por sukcesigi ĝin.

Devo nia estas aŭdi ĝian vokon, peni kaj klopodi ke ĝi ne estu malpli sukcesa ol la VII.<sup>a</sup>; se eble, la VIII.<sup>a</sup> superu la VII.<sup>an</sup>, ĉar nia Asocio plimultigis la nombrojn, havas nun pli da rimedoj kaj, plue, por la organizado de la VIII.<sup>a</sup> estas aliaj tre rimarkindaj favoraj cirkonstancoj kiujn ni ne havis por iu alia Kongreso: La Asturia Provinca Deputitaro sendis komisiulon al la VII.<sup>a</sup> kun la celo proponi la okazigon de la VIII.<sup>a</sup> en Oviedo. Tiu ĉi propono estis akceptita aklande kaj kun dankesprimoj. Mi atentigas vin pri la graveco de tiu propono; ĝis nun ni bezonis peti helpon al la aŭtoritatoj, nun estas grava oficiala organizo kiu prenas sur sin la taskon kunlabori kune kun ni en la organizo de la VIII.<sup>a</sup>. Ni montru nin indaj je tia konfido kaj simpatio al

nia afero. Fine, mi permesas al mi inviti ĉiujn hispanajn esperantistojn kiuj pro diversaj motivoj, ankoraŭ ne estas en niaj vicoj, al la kunlaborado, kunpropagandado kaj enskribado iliaj kaj de iliaj lokaj aŭ regionaj organizaĵoj en la Hispanan Esperanto-Asocion por la plej baldaŭa kaj certa atingo de nia komuna celo: La triumfo de Esperanto en nia kara Hispanujo.

La Prezidanto de H. E. A.  
VICENTE ALONSO.

---



ORGANIZINTOJ.—La tri grandaj literoj M de la Kongreso:

S-roj Mojado, Martinez kaj Mangada

# LISTO

de la aliĝintoj al la «VII.<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto»

		Pesetoj	
Num.º	1 S-ro	Mariano Mojado, de Madrid.....	10
»	2 »	Carlos Martínez Fernández, de Sevilla.....	10
»	3 »	Vicente Alonso Sanz, de Madrid.....	6
»	4 S-ino	Josefa Bascones Arauzo, de idem.....	6
»	5 S-ro	Julio Mangada Rosenörn, de idem.....	6
»	6 F-ino	Amelia Mangada Sanz, de idem.....	6
»	7 »	Marina Mangada Sanz, de idem.....	6
»	8 S-ro	Julián Sosa, de idem.....	6
»	9 S-ino	Maria Medialdea, de idem.....	6
»	10 S-ro	Pedro Gil Arrué, de idem.....	6
»	11 »	Pelayo Moreno Ferrer, de idem.....	6
»	12 S-ino	Carmen San Sebastián, de idem.....	6
»	13 S-ro	Emilio del Barrio Martín, de idem.....	6
»	14 »	Manuel Maynar Barnolas, de Zaragoza.....	6
»	15 F-ino	Sara Maynar Escamilla, de idem.....	6
»	16 S-ro	Honorato Moncalvillo, de Trasona (Asturias).....	6
»	17 »	Roberto Maraury, de Bilbao.....	6
»	18 S-ino	Elvira G. Caamaño, de idem.....	6
»	19 S-ro	Francisco Zarzosa López, de idem.....	6
»	20 »	Bernardo Coll, de Palma de Mallorca.....	6
»	21 F-ino	Elvira Ordóñez Ibáñez, de Madrid.....	6
»	22 »	Josefina Francés Ordóñez, de idem.....	6
»	23 S-ro	David Martín Lozano, de idem.....	6
»	24 F-ino	María Aguirre Pérez, de idem.....	6
»	25 S-ro	Jacinto Martín Lozano, de idem.....	6
»	26 S-ino	Calixta Fernández Rodríguez, de Sevilla.....	6
»	27 F-ino	María Jesús Escacena, de idem.....	6
»	28 S-ro	Enrique de Uriarte Clavería, de idem.....	6
»	29 »	Julián Romero Palomino, de idem.....	6
»	30 S-ino	Ana de Cosas Domínguez, de idem.....	6
»	31 S-ro	Cristóbal Rodríguez Pérez, de idem.....	6
»	32 »	Luis del Valle Guisado, de idem.....	6
»	33 »	José Llorca Rosado, de idem.....	6
»	34 »	Juan del Pozo Candiles, de idem.....	6
»	35 »	Manuel Vicente Romero, de idem.....	6
»	36 »	Fernando Coello Grosso, de idem.....	6
»	37 »	Santos Goyuro González, de idem.....	6
»	38 »	Manuel Marchante Cuadrado, de idem.....	6
»	39 »	Carlos de San Antonio López, de Madrid.....	6
»	40 S-ino	Aurelia Nieto Arteché, de idem.....	6
»	41 F-ino	I. ucrecia de San Antonio Nieto, de idem.....	6
»	42 S-ro	Isidoro Díaz Maqueda, de Tocina (Sevilla).....	6
		Daúrigas.....	260

		Pesetoj
	Antaŭa sumo.....	260
Num.º 43	S-ro Antonio Mármol Cordero, de Villanueva Minas (Sevilla).	6
» 44	» Juan Moros Ojeda, de idem .....	6
» 45	» Diego Requena Feu, de Salamanca .....	6
» 46	» Alberto M. González, de Gijón (Asturias).....	6
» 47	» Ignacio Casas Riaño, de Burgos .....	6
» 48	» Antonio Jiménez Mora, de Oviedo.....	6
» 49	» Alfredo Fernández Figaredo, de idem.....	6
» 50	» Fernando Fernández Suárez, de idem .....	6
» 51	» Luis García Fernández, de idem.....	6
» 52	» José González Fernández, de idem .....	6
» 53	» Benigno de Luna Gómez, de Madrid.....	6
» 54	F-ino Josefina de Luna Corral, de idem.....	6
» 55	» Gloria de Luna Corral, de idem .....	6
» 56	S-ro Joaquín Escacena Castanet, de Sevilla .....	6
» 57	F-ino Enriqueta Escacena Bermejo, de idem .....	6
» 58	» Carmen Rodríguez Rodríguez, de idem .....	6
